Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor Antwerpen X. ISSN 1013-2031

Jarkolekto 38 - trimonata
08/3

IPR

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
Jozefo Németh (red.)
Luiza Carol
Luiza Oberrauch Madella
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Elzbieta Biskup
Sjoerd Bosga
Aida Cizikaite
Probal Dasgupta
Emil Hrvatin
Marija Jetkovic
Dennis Keefe
David Kelso
Zsofia Korody
Tiina Oittinen
Indre Pileckyte
Ewoe Sagbadjelou
Angela Tellier
Mihai Trifoi





ilei
Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Jozefo NÉMETH: *Enkonduko* 3
David KELSO – Angela TELLIER: *Projekto „Lingvolanĉilo”* 4
Ni konferencis en Benino 8
– *Saluto de UEA al la 41-a ILEI-Konferenco* (Probal DAŜGUPTO) 8
– *Raporto pri la 41-a Konferenco de ILEI* (Ewoé SAGBADJELOU) 9
– *Iom da statistiko pri la konferenco* (Aida ČIŽIKAITĖ) 11
Mihai TRIFOI: *Tago de la Lernejo 2008 en Roterdamo* 14
Sjoerd BOSGA: *Financa raporto 2006/07, buĝetoj 2008/09 de ILEI* 15
Dennis KEEFE: *Kiel starigi kaj organizi LF en via urbo? (parto II.)* 22
El landoj kaj sekcioj (FI, DE, IT, HR, PL) 30
Somera E-Studado kaj lernu! kuniĝis en Slovakio (Indrė PILECKYTĖ) 35

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Radojica PETROVIĆ, *Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. (+381 32) 371053, fakso: (+381 32) 342101, <radp@ptt.yu>.* Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto InterKulturo.

Sekretario: Atilio ORELLANA ROJAS, *Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel. (+31 70) 3556677, <atilioorellanarojas@gmail.com>.* Sekretariaj taskoj. Ekzamenoj.

Estrarano pri financoj: Sjoerd BOSGA, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel. (+46 21) 41 70 45, <sjoerd@esperanto.se>.* Administra sistemo.

Estrarano: Zsófia KÓRÓDY, *Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983, <zsofia.korody@esperanto.de>*. E-centroj, instrukapabligado.

Estrarano: Aida ČIŽIKAITĖ, *Kapinių 11-15, LT-50189 Kaunas, Litovio. Tel. (+370) 37 793408. <aidute@mail.lt>*. Konferencoj. Scienca agado.

Estrarano: Mihai TRIFOI, *Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, Rumanio. Tel.(+40)267-365319,<trifoi@honoris.ro>*. Lerneja agado.

Estrarano: Yas KAWAMURA, *13-8 Nakayata-cho Babanomizo Kameoka-si, Kyoto-fu, JP-621-0855, Japanio. <esperanto@d0y0b.com>.* Azia agado.

Titolpaĝe supre: vizito en rifuĝejo de Agame, kie instruas E-on Francis AGBENOU (foto de Vlad'ka CHVÁTOLOVÁ); malsupre: vizito en orfejo, kie instruas Latifou GBADAMASSI (foto de Monique ARNAUD)

La nunan numeron ni sendis al la presejo 14 septembro 2008, redaktofino por la sekva numero 31 oktobro 2008.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]
***Vicprezidanto*: Detlev Blanke**, Germanio, Prezidanto de la Societo pri Interlingvistiko
***Membroj*:**
Vera Barandovská-Frank, Germanio, Universität Paderborn; AIS[2] San Marino
Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah
Renato Corsetti, Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]
Probal Dasgupta, Barato, LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]
Michel Duc Goninaz, Francio, Université de Provence; AdE[1]
Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas
Wim Jansen, Nederlando, Universiteit van Amsterdam
Boris Kolker, Usono; AdE[1]
Ilona Koutny, Pollando/Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu; AdE[1]
Mauro La Torre, Italio, Università degli Studi Roma Tre
Maria Majerczak, Pollando, Uniwersytet Jagielloński w Krakowie
Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia Universitato de Paranao; AdE[1]
Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения
Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu
Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet
***Sekretario:* Aida Čižikaitė**, Litovio; estrarano de ILEI

[1] AdE – Akademio de Esperanto
[2] AIS – Akademio de la Sciencoj, San Marino

Enkonduko

La ĉefartikolo de la nuna numero venas el Britio prezentante la projekton „Lingvolanĉilo" (angle *Springboard to Languages).* Gratulojn kaj sukceson al niaj gekolegoj tie!

La plej grava ĉi-jara evento de ILEI, sendube, estas nia Konferenco en Afriko. Tiu pionira entrepreno, eble, estis iom riska, tamen sukcesa laŭ la raportoj de *Ewoé* kaj *Aida*. Pliajn fotojn kaj materialojn vi trovos en nia retpaĝo kaj en IPR 08/4.

Pri la konferenco 2009: la Estraro elektis Krakovon kiel konferenc-urbon. La konferenco okazos en la semajno antaŭ la UK. La Estraro kunsidos kun la lokaj organizantoj fine de oktobro en Krakovo. Post tio aperos aliĝilo por la konferenco, rete kaj en IPR 08/4. La unua, belaspekta varbilo jam nun videblas en la retpaĝo de ILEI.

En la nuna numero ni aperigas la financajn raportojn 2006-2007 kaj la buĝetojn 2008-2009 de ILEI. Dum tiu ĉi jaro oni povis plurloke renkonti diskutojn (en- kaj ekster ILEI-rondoj), kiuj parte eksplodis pro la manko de tiuj raportoj. Ni esperu, ke nun sekvos pli trankvila periodo kaj la raporto 2008 jam aperos ĝustatempe.

Bonan legadon al vi ĉiuj!

Jozefo Németh, redaktoro

Projekto „Lingvolanĉilo”

de David KELSO kaj Angela TELLIER

Multaj legantoj de IPR konas la nomon *Lingvolanĉilo*; malmultaj tamen certas pri tio kio ĝi precize estas. Fakte, *Lingvolanĉilo* estas la esperanta nomo de la brita projekto *Springboard to Languages*. Por tiuj, kiuj ŝatas terminologiajn puzlojn: la kutima traduko de la angla '*springboard*' estas 'saltotabulo'; tamen tiu vorto pli ĝuste priskribas la rigidan '*diving-board*' (plonĝtabulo) super naĝejo; '*springboard*' estas la resaltiga tabulo etendiĝanta tuj super la akvo; franclingve, '*tremplin*'. Tiun nomon oni elektis specife por esprimi la propedeŭtikan karakteron de la lernprogramo.

La programo *Lingvolanĉilo* instruas E-on, ne por si mem, sed por evoluigi en la lernantoj lingvo-konscion, kiel bazon por posta lingvo-lernado. Estas ĝenerale agnoskate, ke dulingvaj infanoj pli rapide kaj pli sukcese lernas fremdan lingvon ol unulingvaj; cetere, ju pli da lingvoj oni lernas, des pli facilas tiu lernado. Oni hipotezas, ke tiuj fenomenoj rezultas de la 'lingvo-konscio', t.e. konscio pri la karaktero de lingvo, pri tio kiel funkcias lingvoj kaj pri la procedo de lingvo-lernado. Ĝi estas speco de 'metascio', t.e. 'scio pri sciado'; estas akceptate nun de pedagogoj, ke oni pli bone lernas kiam oni komprenas la karakteron de la lernataĵo, kaj la manieron en kiu oni lernas.

Dum almenaŭ 80 jaroj, advokatoj por E-o pripretendas la 'propedeŭtikan' valoron de la lingvo. Fakte la pruvoj estas malmultaj kaj malfortaj. Tamen, ne mankas pruvoj ke E-o estas pli facile lernebla ol aliaj lingvoj. La studoj de *THORNDIKE* kaj *KENNON*, kiuj efektiviĝis en la dudekaj jaroj, kredeble estas la plej sciencaj kaj sendependaj. Krom tio, estas multaj *indikoj* ke Esperanto estas ne nur facile lernebla, sed ankaŭ helpas en la lernado de aliaj lingvoj. La kvarjara studo fare de *HALLORAN* en Britio en la lernojaroj 1947-51 estas eble la plej konvinka, kvankam etskala. Ankaŭ la studoj de *EATON* el la tridekaj jaroj, *SZERDAHELYI* el la sesdekaj, *FRANK* el la sepdekaj, *FORMAGGIO* el la okdekaj, *TIŠLJAR* kaj *BISHOP* el la naŭdekaj jaroj estas tre interesaj. Malgraŭ la manko de nerefutebla pruvo, estus tute racie supozi, surbaze de la rezultoj de la ĉi-supraj studoj, ke E-o havas ian, ioman propedeŭtikan valoron.

La specifan kuntekston de la projekto *Lingvolanĉilo* kreis la iom surpriza decido de la brita registaro en 2003/04. Jam de multaj jaroj la

britoj ĝuas bedaŭrindan reputacion pri lingvolernado. Ĉu ĉar Britio estas insulo, la enloĝantoj ne emas lerni fremdajn lingvojn tiom kiom iliaj najbaroj en la kontinenta Eŭropo? Certe, ekde kiam la angla lingvo, pro la domina rolo de Usono en tutmonda komerco kaj milita potenco, iĝis la plej vaste uzata lingvo en la mondo, des malpli videblas tia emo! Dum la lastaj dudek jaroj la nombro da kandidatoj por lingvoekzamenoj je niveloj abiturienta kaj antaŭ-abiturienta, efektive draste falis: iom malsame ol preskaŭ ĉie alie en la mondo. Kun la nobla celo provi instigi ĉe junuloj entuziasmon lerni lingvojn la registaro iom nesence decidis, ke fremdaj lingvoj ne plu estu devigaj en gimnazia lernprogramo por junuloj pli ol 14-jaraj; samtempe tamen ili anoncis, ke antaŭ 2010 almenaŭ unu fremda lingvo estu devige instruata en ĉiu bazlernejo en Anglio (la eduksistemoj de Skotlando, Kimrio kaj Nordirlando estas administre apartaj). La registaro ne publike klarigis sian rezonadon por ĉi tiu decido, sed oni devas konjekti ke, ĉar junaj infanoj pli facile (kaj ŝajne pli plezure) lernas lingvojn ol adoleskuloj, oni esperas, ke ili elektos daŭrigi lerni volonte en gimnazio. Nu, eble.

Tiu decido tamen prezentis grandajn problemojn por bazlernejoj. En Britio (kiel en multaj landoj) la instruistoj en bazlernejoj estas ĝeneralistoj, ne fakuloj. Ekzistas en bazlernejoj nek instrurimedoj, nek aparato, nek sperto (eĉ ne vera entuziasmo) pri lingvoinstruado - kaj malmultas proponota helpo de la registaro. Mankas ankaŭ spaco en la instru-horaro, pro la neceso enkonduki novajn programojn laŭ la postuloj de la ministerio pri edukado-programoj pri alfabetismo, pri civitanismo, pri matematiko, pri sporto k.c. Do, jen la kunteksto; jen ŝanco por *Lingvolanĉilo:* tian programon senspertaj instruistoj ja povas enkonduki en bazlernejon; la materialoj estas malmultekostaj; haveblas kaj konsilo kaj trejnado subvenciataj.

En 2005 oni koncipis kaj evoluigis la programon, surbaze de materialoj jam preparitaj por jama programo 'Urso-kurso', kaj 'premieris' la programon ĉe granda tutlanda Lingvo-Foiro en Londono, novembron 2005. Samtempe okazis publiko-kampanjo per dissendo de invitleteroj kaj per reklamo en landa ĵurnalo pri edukado (*Times Educational Supplement*). La unua provlernejo komencis uzi la materialon en septembro 2006, komence de la lernojaro; sekvis aliaj (tamen ja *unu*-ope) ĝis hodiaŭ, kiam sekvas nian programon kvin provlernejoj. Tio ja estas la plej malfacila aspekto de la tuta projekto: konvinki la lernejestrojn, ke *Lingvolanĉilo* estas valora, utila ero por ilia instruprogramo, ke ili ellasu el la lernprogramo ion alian malpli



La gelernantoj de la Scorton-lernejo kun la instruistino Alison DODD

valoran – tia decido por lernejestro estas malfacila. La programo realigeblas laŭ tri alternativaj manieroj, sed la kerna ideo ĉiam estas la sama: ĝeneralaj instruistoj transprenos la tutan instruadon kaj sendepende gvidos la projekton. Laŭ maniero A, la programon prezentas dum du jaroj faka E-instruisto, dum la ĝenerala instruisto (kaj eventuala asistanto) ĉeestas la instruadon. Laŭ maniero B, la E-instruisto kaj la ĝeneralisto dividas la instruadon, tiel, ke la ĝeneralisto firmigas kaj pliampleksigas la laboron de la e-isto. Laŭ maniero C, la ĝeneralisto provizas la programon ekde la komenco, kun subteno kaj konsilo de fakulo pri E-o. Kiun manieron uzas kiu lernejo dependas, kompreneble, de la disponeblo de e-ista instruisto kaj de la memfido de la instruistoj en la lernejo.

La ĉefa financa subtenanto de la projekto estas la landa asocio, E-Asocio de Britio; kontribuas ankaŭ *ESF* kaj *Fondaĵo Hodler '68*. La kontribuon de ESF oni uzas specife por komisii sendependan taksadon de la tuta projekto fare de la Pedagogia Fakultato de la Universitato de Manĉestro. La esploristoj/taksantoj lastatempe eldonis raporton pri la unua jaro de la projekto. La trovitaĵoj estas ĝenerale pozitivaj. Evidentas, ke la instruistoj kaj lernejestroj ŝatas la programon, precipe la altkvalitajn

lernmaterialojn. Ni devas agnoski, ke la lernejanoj ne senescepte entuziasmas (ĉu pro gepatra influo?), sed la plimulto ĝuis la sperton kaj kredis, ke ili jam profitas. Estas tro frue por mezuri pliiĝon de lingvo-konscio aŭ ŝanĝon en la opinioj de la geknaboj, sed jam vidiĝas diferencoj inter la geknaboj el diversaj lernejoj, en diversaj komunumoj, kun malsamaj enloĝantaroj. La instruistoj rimarkis, ke la lernejanoj progresas ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la angla lingvo, kie la propedeŭtika efiko lerni duan lingvon *ŝajne* jam percepteblas.

Je la komenco oni esperis, ke eblos fari klasikan komparon de la projektaj lernantoj kontraŭ paralela kontrolgrupo. Praktike, ĉiuj lernejanoj en koncernaj jargrupoj en ĉiu lernejo partoprenas la projekton (entute pli ol 200 lernantoj), sekve ne eblas trovi taŭgajn kontrolgrupojn en la samaj lernejoj. Nekompareblaj malsimilecoj inter la projektaj lernejoj kaj aliaj lernejoj tro grandas por ebligi validajn komparojn, sen treege detalaj (kaj kostaj) statistikaj ĝustigoj. Pro tio, ekde nun la taksado dependos de metodiko nomata en la angla lingvo '*case-study approach*' (aliro karakterizita de intensiva studo de unuopaj kazoj). Ĉu eblos aŭ ne eblos pli poste fari sciencan komparon inter lernejanoj en la projekto kun aliaj, kompareblaj lernejanoj, por plifortigi rezultojn pri la propedeŭtika valoro de E-o, estos poste decidite. La rezultoj de tiu ĉi sendependa taksado, fare de prestiĝa universitato, tamen estos valoregaj.

Unu interesa trovitaĵo, eĥo de la laboro de *HALLORAN* antaŭ pli ol 50 jaroj, estas, ke *ŝajne* E-o helpas la malpli kapablajn geknabojn pli ol ĝi helpas la pli kapablajn. *Eble*, pli kapablaj lernantoj lernus ajnakaze, sed por la malpli kapablaj pli gravas la cirkonstancoj de la lernado, ekzemple la kompreneblecо de la lernobjekto (ĉi-kaze, E-o).

Certe estas sciate jam de longe, ke la rolo de specifa instruataĵo multe pli gravas por malpli kapablaj lernantoj ol por la pli kapablaj; ne malpli gravas la rolo de instruisto.



Nu, jen resumo de la projekto *Lingvolanĉilo*. Ĝis nun, ege kontentige, kvankam, ĉar estas perhoma projekto en homa mondo, ekzistas problemetoj kaj malglataĵoj. Sen ajna dubo la ĉefa problemo estas aligi provlernejojn. Kiel scias legantoj de IPR, instruistoj estas karakterize konservativaj; eble, en bazlernejoj, eĉ pli ol en gimnazioj; kaj, kredeble, lernejestroj tiom pli! Krome, temas pri Anglio, naskejo de la tiel nomata tutgloba lingvo. En ĉiu kazo ni dankas al forta, iniciatema lernejestro (ina, ĉiukaze) kiu pretas defendi sian decidon al eduka instanco, superaj oficiuloj, gepatroj kaj instruistaj kolegoj. Eble, ju pli progresas la projekto, des pli interesiĝantaj provlernejoj povos dependi ne de niaj teoriaj argumentoj, sed de reala sukceso en jamaj provlernejoj. Ni esperu ……

Vidiĝis multa intereso pri la projekto ene de la E-komunumo. *Lajos (Ludoviko) MOLNÁR* el Budapeŝto fondis retgrupon *Lingvolanĉilo* por promocii similajn iniciatojn tra Eŭropo. Ni disponigas senpagajn ekzemplerojn de la 'instrupako' al interesataj landaj kaj fakaj organizoj kaj 'informpakojn' al multaj dekoj da petintoj (la kompleta instrupako kostas €50). Espereble la aĉetintoj ekzamenos kaj konsideros traduki la anglalingvajn tekstojn en siajn proprajn lingvojn. Ĝis nun, mi bedaŭras raporti, neniu firme deklaris sian intencon tion fari. Plena informo pri la projekto haveblas ĉe *www.springboard2languages.org*, plejparte anglalingve, ĉar *Lingvolanĉilo* estas por anglalingvaj infanoj en anglalingvaj lernejoj.
Specifajn demandojn ni klopodos respondi, sed bonvolu memori, ke ni estas ege malmultaj volontuloj kaj la farendaĵoj ege multaj. Skribu al *info@springboard2languages.org*.

Ni konferencis en Benino

Saluto de UEA al la 41-a ILEI-Konferenco

Estimataj kongresanoj,

En la nomo de UEA kaj en mia propra, mi varme salutas la 41-an konferencon de ILEI okazontan en Portonovo, Benino, de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2008, kiun mi bedaŭras ne povi persone ĉeesti. Mi estas iusence ponta ulo inter ILEI kaj UEA, ĉar dum la jaro 2006-07 mi estis la prezidanto – post kelkjara membreco – de la Internacia Ekzamena Komisiono, kiun kune stiras la komitatoj de UEA kaj ILEI, por funkciigi la

sistemon de Internaciaj Ekzamenoj kune organizitan de tiuj du asocioj; la ponto persone salutas la kongresantan ILEI! Permesu al mi iom pontifiki.

La gravecon de via konferenco ne eblas tro substreki. Mondan E-konferencon oni unuafoje okazigas en Afriko. Pro la aparta historio de Afriko – jam ekde la momento, kiam la unua homo aperis en orienta Afriko antaŭ jarmilegoj, kaj ekde la formiĝo de la unua homa ŝtato en Egiptio – la tuta mondo prave atentas la evoluon de ĉiaj evoluigaj agadoj en tiu patrina kontinento. Ĉiuj scias, ke en la ĵusaj jarcentoj tiun kontinenton plagis multaj suferoj. Sed ĉiuj ankaŭ scias, ke pro la politikaj streboj de multaj figuroj de *NKRUMAH* kaj *NYERERE* (inter kiuj troviĝis amika debato, ĉu la evoluo devus okazi ĉefe urbocentre, laŭ *NKRUMAH*, aŭ ĉefe kampare, laŭ *NYERERE*) ĝis la giganta kaj monde aprezata *NELSON MANDELA*, kaj pro la kulturaj streboj de tuta galaksio da steluloj de *FANON* kaj *ACHEBE* ĝis *NGUGI*, kiuj kreis la bazojn de la postkoloni-epoka tagordo por la homaro, la suferanta Afriko fariĝis ankaŭ gvidanta kontinento.

La mondo devas ankoraŭ pli bone lerni, kiel plej saĝe stiri la interreagadon de kulturoj en kaj ekster Afriko. La pedagogio estas esenca ejo por tiu lernado necesa por ni ĉiuj. Mi estas certa, ke la ILEI-Konferenco en Portonovo signifos gravegan paŝon antaŭen por la tuta homaro. La fakto, ke homoj ekster la e-istaj rondoj malmulte rimarkas la konferencon, ne estas io signifa en kontinento, kie oni lernis flegme akcepti la portempan ŝajnon de malgrandeco en ĉiuj fortostreĉoj, kiuj poste montriĝas grandsignifaj. Ni fosu nian sulkon.



Amike salutas viajn laborojn: *Probal DAŜGUPTO Linguistic Research Unit, Indian Statistical Institute, 203 B.T. Road, Kolkata 700108, India, tel. +91-9831815042*

Raporto pri la 41-a Konferenco de ILEI

de Ewoé SAGBADJELOU

La ĉi-jara konferenco de ILEI okazis en Portonovo (Benino) de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2008 kun la partopreno de e-istoj el Afriko, Azio kaj Eŭropo. En la unua tago de la aranĝo, post alveno de la konferencanoj, komenciĝis sub la gvido de *Tieko ISIKAWA* Interkona Vespero dum kiu ĉiuj sin prezentis, interparolis en etoso amikeca.

Merkredo, la 30-a de julio, estis dediĉita al la oficiala Inaŭguro de la konferenco. Ĝi ekis per la hiso de esperanta flago kaj la kantado de „La Espero“. Sekvis paroladetoj de diversaj eminentuloj: unue de *Hori YASUO* kaj *Renée TRIOLLE*; poste de *Privas TCHIKPE,* pioniro de la benina E-movado, kaj de *Adelabu SAIBU* je la nomo de la urbestro de Portonovo. Ĉi-lasta, dum la malferma ceremonio sciigis al partoprenantoj la antaŭajn nomojn (*Adjadje, Hogbonou*), kiujn havis la urbo Portonovo, riĉa pro siaj Songhai-centro, preĝejoj, moskeoj, vendejoj kaj manĝoj diversaj. Por fini li deziris, ke dua tia konferenco okazu en Benino. Indas mencii la intervenon de s-roj *Francois HOUSSOUNOU* (LKK-ano, prezidanto de la Benina sekcio de ILEI), *Latifou GBADAMASSI* (LKK-ano, prezidanto de la landa E-Asocio) kaj *Francis KODJOVI AGBENOU* (oficisto en la Afrika Oficejo) por prezenti raporton pri siaj respektivaj agadoj. Estis laŭtlegitaj salutoj de AIS kaj ISAE. Tuj poste, efektiviĝis entute tri prelegoj: *Renée TRIOLLE* informis pri UNESKO, ties rilatoj kaj kunlaboro kun UEA. *Hori YASUO* parolis pri la E-movado en Azio. *Jean Pierre BOULET* gvidis diskuton unue rilate al edukado en Afriko, pri la maniero laŭ kiu patrino devas prizorgi infanojn, due pri herboj/plantoj uzeblaj en kuirado kiel manĝoj kaj en kuracado. Li parolis rilate al la ielo utiligi tiajn herbojn. Venis la momento ekzameniĝi: *Mireille GROSJEAN,* respondeculino pri la organizado de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA, anoncis la ekzamenojn senpagaj. De la gramatika testo ĝis la parola parto, la kandidatoj laboris dum tri tagoj. Ĉe la fino, la sukcesintoj ricevis atestilojn. Aliaj eroj de tiu inaŭgura tago estis la konversacia kaj amika rondoj, kies prizorgantoj intervenis preskaŭ ĉiutage.

La laboroj de ĵaŭdo komenciĝis jene: *Ana MONTESINOS* enkondukis siajn *lingvajn ludojn por la klasĉambro*, prezentante diversajn tipojn de bildludoj, kio permesis al ĉeestantoj elekti tia(j)n aŭ alia(j)n objektojn uzeblajn en iliaj respektivaj landoj. Scio pri manĝoj, manĝkutimoj de la ĉeestantoj laŭ ties landoj aldoniĝis al ŝia laboro alian tagon. *Vlad'ka CHVÁTALOVÁ*, en la traktado de sia temo por lingva festivalo – *multlingva renkontiĝo kaj dialogo inter kulturoj* – informis la partoprenantojn pri diversaj etnoj, lingvoj parolataj en ties landoj, iliaj devenoj ktp. Fine de la konferenco okazis *Lingva Festivalo* kun prezento de 15 lingvoj, el kiuj 6 estis afrikaj. Notindas, ke ambaŭ s-aninoj finis siajn taskojn post kelktaga renkontiĝo kun partoprenantoj foje en komisionoj. Samhore kaj ankaŭ en sekvaj tagoj, kunsidis komitatanoj de ILEI por decidi rilate al la aferoj de la ligo. Posttagmeze okazis la unua ekskurso al *Aguegues*. Aliaj vizititaj lokoj

dum la aranĝo estis *Adjarra*, *Bimins*, *Dangbo*, kiuj prezentis al la tien-vojaĝantoj buntajn vidindaĵojn.

Vendrede daŭris la kutima programo de la konferenco kun siaj ĉiutagaj programeroj. Sabate okazis Simpozio, dum kiu ni sekvis prelegojn kaj partoprenis en diskutoj. Inter la amuzaj eroj troviĝis muzikado kaj origamio: *Hori,* montrante kolektitajn muzikilojn kaj ludilojn, aŭskultigis iliajn melodiojn. Li ludis kaj ludigis kelkajn instrumentojn. Kantoj kaj aplaŭdoj akompanis lin, kio amuzis ĉiujn. Estis okazo konatiĝi kun arto de paperfaldado. Tion prezentis ges-anoj „Mayuko kaj aliaj". Ili lernigis kiel krei diversajn formojn de objektoj (birdoj, kovertoj) per paperfaldo.

Dimanĉe okazis tuttaga ekskurso tra Portonovo. Eksterafrikaj samideanoj kolektis monon por pagi partoprenon en la ekskurso de ĉiuj dezirantaj afrikanoj.

En la antaŭlasta tago de la konferenco, ĝenerala asembleo antaŭis la solenan Fermon. Post tio, la partoprenantoj markis la eventon plantante unu arbidon en la konferenceja domo *Songhai-centro*. La vespero estis agrabligita per spektaklo (kantoj, dancoj, tamtam-ludoj, vestoj) de loka teatrogrupo tre ŝatata de konferencanoj, kiuj senhezite imitodancis. Dum la disdono de atestiloj pri la ekzamenoj, la afrikaj helpantoj ricevis etajn suvenirojn de Nederlando – lando de la ĉi-jara UK, la eksterafrikaj helpantoj ricevis afrikajn muzikilojn. La oficiala disiĝo ekis en la posta tago, tuj post la matenmanĝo.

Mi pasigis belan semajnon en Portonovo, renkontante multajn gesamideanojn (el diversaj landoj), kun kiuj mi lernis, babilis, ludis, amuziĝis, manĝis, resume partoprenis al programeroj.

Iom da statistiko pri la konferenco

Al la konferenco aliĝis 73 personoj, sed partoprenis malpli. 21 personoj el ekster Afriko: el Francio 7, el Japanio 5, el Aŭstralio 2, el Nederlando 2, po 1 persono el Ĉeĥio, Britio, Italio, Svislando kaj Litovio. El Afriko partoprenis 23 personoj: 15 el Benino, 3 el Togolando, 2 el Burundio, 2 el Ganao, 1 el Ebura Bordo. Nur 1 persono venis por 1 tago, kaj 1 persono por 3 tagoj. Ambaŭ el Benino. Nur 2 eksterafrikaj aliĝintoj ne partoprenis; por pliaj afrikaj partoprenantoj mankis financaj rimedoj. Dum la semajno de la UK prof. *A. PORTILLO* el Venezuelo informis, ke li ne povas veni; *L. MADELLA* el Italio eĉ ne planis veni, nur per aliĝkotizo



subtenis la konferencon. UEA dediĉis 1 000 EUR por subvencioj, ILEI proprakoste subvenciis ĉirkaŭ 10 partoprenantojn, kelkaj e-istoj faris pli aŭ malpli grandajn personajn donacojn (listo de sponsoroj aperos en la retpaĝo de ILEI).

La franca sekcio surloke decidis inviti virinon esperantistinon – *Yollande AGBENOU*. *François HOUNSOUNOU* ne povis ĉeesti dum la tuta konferenco, do rapide trovis anstataŭanton – *Jozeph TCHOKPODO* – la ĝenerala sekretario de la landa asocio de Benino. Kelkaj partoprenantoj venis pli frue kaj tuj iris al la Centro aŭ ekskursis – laŭ propra deziro.

La lokaj organizantoj klopodis renkonti ĉiujn, sendepende, en kiu tago kaj kiu horo la partoprenantoj venis. Dankon al ili pro la zorgo. *Tieko ISIKAWA* zorgis pri pretigo de la konferencaj sakoj, helpis al la prezidanto de LKK *Charles ALOFA* dum la Solena Inaŭguro, ankaŭ gvidis la programon dum la Interkona Vespero kaj la unua konferenca tago. Dum la solena Inaŭguro partoprenis reprezentanto de la urba municipo kaj princo de unu el la lokaj triboj, kiun invitis samideanoj *Monique ARNAUD* kaj *Jean-Pierre BOULET*. Reciproke pro la omaĝo, ili estis invitataj al edziĝfesto de la princo, kiu okazis tuj post la konferenco. Mankis eblo hisi flagon, sed LKK elturniĝis kaj ni havis dum la tuta konferenco flagon apud la konferencejo. Estis pendigitaj 3 konferencaj afiŝoj kaj 1 informilo (anglalingve, ĉar estis granda grupo de usonaj studentoj) en la restoracio. Kelkaj personoj neespistoj estis interesitaj kaj ofte estis kun ni. Salutvortojn sendis UEA, AIS, ISAE, la prezidanto de ILEI, salutis la prezidanto de landa asocio, la prezidanto de landa ILEI-sekcio, la prezidanto de LKK, la unua e-isto en Benino – *Privas TCHIPKE*. Al la ekzamenoj aliĝis 15 personoj kaj sukcesis 6 (5 afrikaj samideanoj). Dum la Lingva Festivalo estis prezentitaj 6 afrikaj lingvoj (entute 15). Ĉiutage okazis konversacia rondo kaj longaj amikaj neformalaj interparoloj en malpli grandaj grupetoj. La ekskursojn prizorgis kaj gvidis la membro de LKK *Sébastien ESSOU*. Bedaŭrinde la ekskursoj estis tro kostaj por afrikaj samideanoj, sed partoprenantoj decidis kolekti

iom da mono por partoprenigi ĉiujn dezirantojn en la tuttaga ekskurso. La ekskursoj estis tre interesaj kaj vere riĉigis la spertojn de la partoprenantoj.

Dum la postkonferenca ekskurso ni vizitis rifuĝejon, kie ni trovis pli ol 20 esperantistojn (instruas *Francis AGBENOU*, oficisto de AO); tre impresa estis vizito al orfejo, kie instruas *Latifou GBADAMASSI,* kaj al lernejo kie instruas *Pierre HOUENAVO*; ne malpli impresis vizito al unu komencantino – *Julienne*, kiu estas tre progresema persono. Tiu ĉi vivas kun 2 filoj (unu el ili – *Yayra* – estas e-isto, tial ankaŭ ŝi komencis lerni) kaj ŝi sukcesis fondi propran fabriketon por produkti sapon [*vd. la foton sur la 12-a paĝo*], kaj ŝi revas pri plivastigo de la fabriketo. Ĉiuj eksterafrikaj partoprenantoj kunportis laŭ siaj ebloj diversajn materialojn, kiuj estis ekspoziciataj dum la tuta konferenco kaj disdonitaj en la lasta tago. Fine de la konferenco ni plantis oranĝarbon en Songhai Centro, la afrikaj samideanoj baptis ĝin „ILEI-arbo“. [*vd. la foton sube*]



La afrikaj samideanoj petis klopodi okazigi pliajn E-aranĝojn en Afriko, ĉar ili volas lerni mem organizi internaciajn aranĝojn.

La 41-a konferenco de ILEI okazinta en Portonovo, Benino, estis la unua internacia E-aranĝo en Afriko, kiu kunvokis ne nur afrikajn samideanojn. Nek UEA, nek TEJO aŭ iu alia E-organizaĵo ankoraŭ kongresis en tiu ĉi kontinento. ILEI faris la unuan paŝon kaj – mi devas diri – ne mispaŝis. Laŭ la opinio de la partoprenantoj, la konferenco estis sukcesa. Mi samopinias. *Aida ČIŽIKAITĖ*

Tago de la Lernejo 2008 en Roterdamo

de Mihai TRIFOI, *ILEI-estrarano pri lerneja agado*

Kiel kutime dum la UK-oj de E-o, ankaŭ ĉi-jare La Tago de la Lernejo (TdL) okazis en aparta tago, mardon, la 22-an de julio, inter la 10-a kaj 16-a horoj. La temo de la TdL en 2008 estis «*La pedagogia valoro de Esperanto*». Partoprenis ĉ. 50 e-istoj. Danke al la organizintoj de la UK, la ejo kaj la teknikaj kondiĉoj estis bonegaj.

Dum la ses horoj, post la salutvortoj nome de ILEI (*Mihai TRIFOI*), de UEA (*Claude NOURMONT*) kaj de la Nederlanda ILEI-Sekcio (*Rob MOERBEEK*), 17 prelegintoj strebis konvinki la publikon pri la neceso ekspluati pli intense la pedagogian valoron de la Internacia Lingvo kaj pri la neceso eltrovi novajn rimedojn por pli efike prezenti ĝin al lernejaj kaj universitataj instancoj.

La TdL-Programo estis strukturita en tri partoj. Post la enkonduka parto (Salutoj nome de ILEI, UEA kaj NGGE) sekvis du serioj de prelegoj, dum kiuj famaj geinstruistoj de diversaj instruniveloj prezentis siajn spertojn, projektojn, metodojn, rezultojn aŭ opiniojn rilate al la menciita temo. Dum la unua serio de prelegoj estis vera plezuro aŭskulti la prezentojn de *D-ro Maŭro LA TORRE* (La pedagogia valoro de E-o), *Hiddo VELSINK* (Pri la eduka sistemo en Nederlando), *D-ro Renato CORSETTI* (Ĉu la instruista E-movado en Eŭropo estas memvole konstruanta sian muzeon kaj eniranta ĝin?), *D-ro Seán Ó RIAIN* (E-o por plibonigi la lingvolernadon – irlanda vidpunkto), *Prof. Ed BORSBOOM* (Internacia E-Instituto en Hago kaj la Cseh-metodo), *D-ro Humphrey TONKIN* (Instruado de E-o kaj Interlingvistiko en la Universitatoj), *D-ro Ilona KOUTNY* (Trejnado de E-instruistoj en universitato – sperto de la Interlingvistikaj Studoj de UAM), *D-ro Sasaki TERUHIRO* (La instruado de E-o en japanaj universitatoj), *Nina DANILJUK* (E-o en mezaj kaj superaj lernejoj de Ukrainio).

Se la unua serio de prelegoj estis pli «teoria», la dua estis iom «pli praktika» en la senco, ke la prelegintoj prezentis diversajn projektojn, rezultojn, rekomendojn por la enlerneja instruado de E-o. Prelegis: *Zsófia KÓRÓDY* (Interkultura Centro Herzberg: Rezultoj de lerneja instruado por ĝemelurboj kaj por internacia komunikado), *Angela TELLIER* (La evoluo de la projekto *Lingvolanĉilo / Springboard to Languages*), *Zlatko TIŠLJAR* (En lernejojn kiel enkonduko por lernado de aliaj lingvoj), *Stano MARĈEK* (E-o per rekta metodo / Lerniloj kaj didaktikaj materialoj de Stano Marĉek),

Luigia OBERRAUCH MADELLA (Pri la rezultoj de la projekto AKEL), *Jennifer BISHOP* (La instruado de E-o en Aŭstralio), Prof. *Julian HERNANDEZ ANGULO* (Kiel paroligi la gelernantojn kaj stimuli ties apartensenton al KEA kaj UEA), *Maria BELOŜEVIĆ* (Aktivado ene de la projekto «Libera tempo de gelernantoj».

Gvidis la TdL-Programon *Mihai TRIFOI*, teame kun *Dr-o Maŭro LA TORRE* kaj *D-ro Ronald J. GLOSSOP*. Protokolis: *Luigia OBERRAUCH MADELLA* kaj *Anna Maria COLACICCHI*. La sola nia bedaŭro estis, ke la tempo ne sufiĉis por tiom da prelegantoj, tamen ĉiuj respektis strikte la programon. La ILEI-estraro dankas al ĉiuj, kiuj prezentis prelegojn dum la TdL kaj invitas ilin sendi elektronikan kopion al la redaktoro de IPR, *Jozefo NÉMETH* (*jozefo.nemeth@gmail.com*), por eventuala publikigo. Samtempe ni dankas al ĉiuj ĉeestintoj de la TdL kaj atendas ilin denove en Bjalistoko en 2009.

Financa raporto 2006-2007 buĝetoj 2008-2009 de ILEI

de Sjoerd BOSGA, *kasisto de ILEI*

Financa raporto pri 2006 kaj 2007

La rezultkalkuloj de ILEI por 2006 kaj 2007 montras, ke ILEI finance sufiĉe sanas – la elspezoj por plej baza funkciado estas kovritaj de la bazaj enspezoj. Alivorte, membrokotizoj, enspezoj pro ekzamenoj kaj donacoj kovras la kostojn de la eldono de *IPR* kaj la funkciadon de la estraro. En 2007, tiuj enspezoj eĉ pli ol sufiĉis – kaŭze de ne-okazigo de fizika estrarkunsido en tiu jaro (kunsido okazis komence de 2008). 2006 donas pli kutiman bildon – iom da konferenca profito estis necesa por kovri kostojn de estrarkunsido.

Zorgiga por 2007 tamen estis la falo de enspezoj el membrokotizoj kompare kun 2006, de 9309 al 8421 €. Tamen, ili restas signife super la nivelo de 2005 (6972 €), kaj pli-malpli similas al 2004 (8630 €). Por 2008 jam laboro estas farata por rekreskigi la membronombrojn. Zorgiga por 2007 estas ankaŭ la falo de enspezoj por *Juna amiko*, tendenco kiu meritas nian atenton.

Kaj en 2006 kaj 2007 la ILEI-konferenco donis pli grandan profiton ol buĝetite. Kialo de tio estas ne nur tre atenta kaj pesimisma buĝetado kaj iom da bonŝanco, sed ankaŭ la granda kvanto de partoprenantoj (ekz. en 2007 ni buĝetis pesimisme por 45 partoprenantoj, sed estis 70). Pro tio, parto de la

konferenca profito el 2006 (1500 €) estas rezervita por la konferenco en Afriko, 2008. Simile, parto de la konferenca profito en 2007 kreskigas *fonduson Dazzini* por helpi al ne-pagipovaj partoprenantoj de ontaj konferencoj. Alia parto de la konferenca profito estas rezervita en la *fonduso Flugiloj*, helpe al trejnado de junaj instruistoj dum junularaj aranĝoj. Fine, 1000 € aldoniĝas al la *fonduso Szerdahelyi* por aktive subteni projektojn realigotajn de niaj landaj sekcioj kunlabore kun la Estraro.

Kiel en antaŭaj jaroj, kostoj por "honorarioj ĝenerale" estis nulaj, kvankam ni daŭre serĉas pliajn kunlaborantojn. Ankaŭ "informado" denove estis (kvazaŭ) nula en ambaŭ jaroj. Enspezoj el donacoj, kiuj ŝajnas subite altaj en 2007, estas klarigitaj el tio, ke en 2007 ni registris ne-repetitajn kostojn de aktivuloj (i.e. por rilatoj kun Unesko) ambaŭ sub elspezoj ("Aktivuloj") kaj enspezoj ("Donacoj").

La seminario en Benino, komence de 2007, estis financata de du subvencioj – de sveda *„Ido"-fondaĵo* kaj de *fondaĵo Afriko* de UEA. Kroma subvencio de UEA estis petita nek por 2006 nek por 2007, ĉar ĝi ne estis bezonata. Tamen, en 2008 – por kiu ni antaŭvidas konferencon kun nula rezulto – la subteno havus pli signifan rolon.

Eldono de *Tendaraj Tagoj 1* estis denove antaŭvidata por 2007, sed ankoraŭ ne okazis. En *fonduso Szerdahelyi* estas mono rezervita por tiu eldono. En 2006 okazis reeldono de la *Manlibro pri Instruado* – sed preskaŭ sen influo al la rezultokalkulo, ĉar plejmulto estis vendata en tiu jaro.

Samkiel en antaŭaj jaroj, la kurzo de la sveda krono kompare kun la eŭro iom oscilis, kaj kaŭzis foje gajnon foje perdon al ILEI. Bonŝance temas pri oscilado, ne pri signifa ŝanĝo.

Buĝetoj por 2008 kaj 2009

La stabila ekonomio de ILEI en la lastaj jaroj, la pozitiva financa rezulto kaj akirado de eksteraj subvencioj ebligas plani investojn en agadprojektojn de ILEI kaj en elektitajn projektojn de landaj sekcioj. Por tio estas bezonata kunlaboro de la sekcioj kaj pli klara subteno al ili. La ideo estas anonci konkurson por projektoj kiujn ILEI subtenu el siaj fondusoj, kaj helpu akiradon de pliaj subvencioj el eksteraj fondaĵoj. Se la Komitato subtenas la planon, la estraro konkretigu ĝin kaj publikigu en *IPR* 08/4 kaj en la retejo de ILEI.

La granda projekto de la jaro 2008 estas la konferenco en Afriko, kiu postulas laboron de ĉiuj estraranoj kaj multaj aktivuloj el kaj ĉirkaŭ Afriko. Kiel ajna projekto, ĝi kostas monon – investitan en la partoprenon de Afrikaj samideanoj. Sekve, kontraŭe al konferencoj en aliaj jaroj, ne estas antaŭvidata

signifa profito. Nur danke al ricevitaj donacoj (1500 €), rezervita sumo el 2006 (1500 €) kaj subteno el *Fonduso Interkulturo* la neta rezulto povas esti nula. Multe pli gravas la organiza kaj eduka rezulto de la konferenco en Afriko. Eblus daŭrigi la Afrikan agadon. La *Fonduso Interkulturo* povas certigi komencajn investojn por formado de interkulture kompetentaj E-instruistoj en Afriko. Ankaŭ akirado de ekstermovadaj subvencioj por Afriko estas bezonata, pri kio ni havas iom da pozitivaj spertoj.

Por 2009 estas antaŭvidataj aliaj projektoj: kontribuoj el *Fonduso Szerdahelyi* kaj *Interkulturo*, konforme al la celoj de tiuj fondusoj, ebligos projektojn de iuj el niaj sekcioj, por kiuj ankaŭ estu serĉataj eksteraj subvencioj. Por tio, kunlaboron ni daŭrigos kun *E@I, lernu.net, Interlingvistikaj studoj de UAM en Poznań* kaj aliaj projektoj kiujn ILEI subtenas. En ambaŭ jaroj 2008 kaj 2009 ni antaŭvidas agadon kadre de la projekto „*Flugiloj de malfacila vento*" (trejnado de ne-profesiaj junaj instruistoj kadre de junularaj aranĝoj).

En 2007 estis enkasigita unua enspezo pro instruista trejnado en kunlaboro kun *UAM*. Tamen, por 2008 kaj 2009 estas buĝetita nulo en ĉi tiu buĝetero. La kialo estas, ke ĝis nun ne estas klare formulita nia interkonsento kun *UAM* el financa vidpunkto.

Ankoraŭ ne estas tute klare, kiam povos aperi preparata lernolibro por progresantoj de *Judit FELSZEGHY* nek renovigita eldono de *Tendaraj Tagoj 1*, sed estas realisme supozi, ke unu aŭ ambaŭ, aŭ ankaŭ nova eldono de la *Manlibro pri Instruado* kreos enspezojn en 2008 kaj ĉefe 2009. Preskostoj estos grandparte kovritaj de subteno el *Fonduso Szerdahelyi* kaj tujaj vendoj (nete nulo kaj pro tio ne indikite en buĝeto).

Pro bonŝance ne tute Eŭropa estraro, kostoj de estrarkunsidoj estos altaj, sed nepraj por bona funkciado de la ligo. Zorgiga tamen estas la kresko de sendokostoj de *IPR* kaj *Juna amiko*. Kostojn de *IPR* oni espereble povos malkreskigi per presado en malpli kosta lando. *Juna amiko* dume restus agado subvenciata el la ĝenerala kaso de ILEI, parte pro kreskantaj sendokostoj.

Konklude pri 2008, estas antaŭvidata deficito, ĉefe kaŭzota de manko de profito el la konferenco. Kompare kun la akumulitaj profitoj de antaŭaj jaroj, tiu deficito tamen estas malgranda, kaj unufoja. Por 2009, danke al verŝajne sufiĉe granda konferenco en Pollando, denove antaŭvideblas pozitiva jara rezulto. Samkiel en multaj organizoj, enspezoj el kotizoj tamen iĝas malpli signifa parto de enspezoj kompare al projekta agado (kiel konferencoj, seminarioj kaj aliaj).

Rezultkalkuloj de ILEI por 2006 kaj 2007

Elspezoj	Buĝeto 2006	Reale 2006	Buĝeto 2007	Reale 2007
Aktivuloj (afranko, vojaĝoj, ktp)	**1500**	**0.00**	**1500**	**741.00**
Bankokostoj (pro ĝen. kaso)	**150**	**47.08**	**80**	**54.90**
Estraro	**3800**	**4360.36**	**4300**	**1685.50**
afranko, reto, ktp	1500	1545.85	1500	1388.65
kunsidoj	2300	2814.51	2800	296.85
Fakaj k.a. kotizoj	**450**	**414.73**	**450**	**547.62**
Honorarioj ĝeneralaj	**500**	**0.00**	**300**	**0.00**
Informado	**200**	**28.63**	**200**	**0.00**
IPR	**6350**	**5543.60**	**5750**	**5810.00**
presado	2800	2780.60	2800	2800.00
redaktado	750	712.00	750	712.00
sendado	2800	2051.00	2200	2298.00
Juna Amiko	**5170**	**4577.03**	**4970**	**4774.25**
presado	2200	2068.50	2200	1921.00
redaktado	470	409.40	470	451.75
sendado	2500	2099.13	2300	2401.50
Libroj (materialo, presado)	**0**	**1535.00**	**600**	**80.00**
Projektoj	**0**	**1668.15**	**3500**	**4688.50**
Rezervo por konf. en Afriko	0	1500.00	0	0
Ceteraj projektoj	0	168.15	0	0
Flugiloj			500	1000.00
Lingvonormoj KdE			1000	0.00
Seminario en Afriko			2000	2688.50
Rezervo – Szerdahelyi			0	1000.00
Profito (sen kalkuli deskribon kaj kurzodiferencojn)	**230**	**2503.57**	**-2920**	**3872.07**
Sumo	18350	20678.15	18730.00	22253.84

Enspezoj	Buĝeto 2006	Reale 2006	Buĝeto 2007	Reale 2007
Donacoj (al ĝenerala kaso)	**1600**	**15.00**	**1600**	**758.00**
Ekzamenoj nete	**200**	**461.29**	**200**	**256.89**
Instruista trejnado (UAM)			**0**	**370.00**
Konferenco	**1200**	**3156.73**	**1200**	**6199.88**
Konferencokostoj		-7250.17		-18386.16
Konferencokotizoj		10406.90		24586.04
Kotizoj	**7100**	**9308.78**	**8080**	**8421.08**
A-landaj	5400	7308.82	6700	6768.18
Abonoj IPR	400	327.60	300	295.20
B-landaj	900	1358.36	800	999.70
Retaj	400	314.00	280	358.00
Rentumo	**100**	**90.60**	**100**	**74.79**
Subvencioj	**1600**	**1600.00**	**3950**	**2348.60**
Projekta subv. de UEA			1650	0.00
Lingvonormoj			800	0.00
Seminario en Afriko			1500	2348.60
Juna Amiko (abonoj)	**6150**	**4481.50**	**3000**	**3658.70**
Abonoj	5800	4408.00	3000	3578.90
Vendoj kaj donacoj	350	73.50	0	79.80
Vendoj (libroj)	**400**	**1564.25**	**600**	**165.90**
Sumo	18350	20678.15	18730.00	22253.84

(ĉiuj sumoj en EUR)

Notoj:
Deskribo de librostoko por 2006: 180 EUR, por 2007: 80 EUR
Kurzodiferencoj por 2006: 1528 EUR (gajno), por 2007: -1380 EUR (perdo)

Fondusoj de ILEI dum 2006 kaj 2007

Dazzini

Saldo je 2006-01-01	**104 EUR**
Saldo je 2007-01-01	**104 EUR**
Donacoj dum 2007	10 EUR
Parto de konferenca profito 2007	1000 EUR
Saldo je 2008-01-01	**1114 EUR**

Erika Linz (fiksa parto)

Saldo je 2006-01-01	**160125 SEK**
Aldono el libera parto	0 SEK
Rentumo	729 SEK
Saldo je 2007-01-01	**160854 SEK**
Aldono el libera parto	2578 SEK
Rentumo	1151 SEK
Saldo je 2008-01-01	**164583 SEK**

Erika Linz (libera parto)

Saldo je 2006-01-01	**1918 SEK**
Pago por infanoj en IIK	-2254 SEK
Transigo al fiksa parto	0 SEK
Rentumo	2915 SEK
Saldo je 2007-01-01	**2579 SEK**
Transigo al fiksa parto	-2578 SEK
Rentumo	4604 SEK
Saldo je 2008-01-01	**4605 SEK**

Flugiloj

Saldo je 2006-01-01	**1618 EUR**
Vendo de manlibroj	100 EUR
Vojaĝkostoj seminari-gvidantoj	-351 EUR
Saldo je 2007-01-01	**1367 EUR**
Rezervo por onta agado	1000 EUR
Rentumo	26 EUR
Saldo je 2008-01-01	**2393 EUR**

Interkulturo

Saldo je 2006-01-01	**20368 EUR**
Repago de ne-uzita parto de subvencio	-6891 EUR
Donacoj	20 EUR
IK-agado en Armenio, ISLA-2006	-268 EUR
Kotizoj kaj laborhoroj de volontuloj	-577 EUR
Rentumo	289 EUR
Saldo je 2007-01-01	**12941 EUR**
Donacoj	10 EUR
Subvencio (parto restinta en Norvegio)	116 EUR
Kotizoj de aktivuloj	-9 EUR
Rentumo	435 EUR
Saldo je 2008-01-01	**13493 EUR**

Koleghelpo

Saldo je 2006-01-01	**642 EUR**
Donacoj	266 EUR
Koleghelpo 2006 (19 membroj)	-169 EUR
Koleghelpo postaj jaroj	-27 EUR
Saldo je 2007-01-01	**712 EUR**
Donacoj	106 EUR
Koleghelpo (14 membroj)	-112 EUR
Rentumo	14 EUR
Saldo je 2008-01-01	**720 EUR**

Kotizoj

Saldo je 2006-01-01	**124 EUR**
Elpreno de frupagitaj kotizoj (por 2006)	-8 EUR
Dumviva kotizo	450 EUR
Saldo je 2007-01-01	**566 EUR**
Elpreno de frupagitaj kotizoj (por 2007)	-8 EUR
Dumvivaj kotizoj	180 EUR
Saldo je 2008-01-01	**738 EUR**

Szerdahelyi

Saldo je 2006-01-01	**1441 EUR**
Saldo je 2007-01-01	**1441 EUR**
Donacoj	250 EUR
Rezervo por onta agado	1000 EUR
Rentumo	29 EUR
Saldo je 2008-01-01	**2720 EUR**

Bilancoj de ILEI por la jaroj 2006 kaj 2007

2006-01-01			
Aktivoj		**Pasivoj**	
Kontoj en euroj	11456 EUR	Fondusoj en euroj	24296 EUR
Kontoj en svedaj kronoj	52504 EUR	Fondusoj en svedaj kronoj	17211 EUR
Postuloj	364 EUR	Bonhavoj de membroj en euroj	4024 EUR
Antaŭpagitaj kostoj	-96 EUR	Ŝuldoj	3890 EUR
Librostoko	790 EUR	Antaŭricevitaj enspezoj	562 EUR
		Propra kapitalo	15035 EUR
Sume	65018 EUR	Sume	65018 EUR

2006-12-31			
Aktivoj		**Pasivoj**	
Kontoj en euroj	20447 EUR	Fondusoj en euroj	17130 EUR
Kontoj en svedaj kronoj	47667 EUR	Fondusoj en svedaj kronoj	18092 EUR
Postuloj	3882 EUR	Bonhavoj de membroj en euroj	6548 EUR
Antaŭpagitaj kostoj	0 EUR	Ŝuldoj	7502 EUR
Librostoko	790 EUR	Antaŭricevitaj enspezoj	4447 EUR
Akumulita deskribo	-180 EUR	Propra kapitalo	15035 EUR
		Rezulto laŭ kalkulo minus deskribo	2324 EUR
		Kurzodiferenco 2006	1528 EUR
Sume	72606 EUR	Sume	72606 EUR

2007-01-01			
Aktivoj		**Pasivoj**	
Kontoj en euroj	20447 EUR	Fondusoj en euroj	17130 EUR
Kontoj en svedaj kronoj	47667 EUR	Fondusoj en svedaj kronoj	18092 EUR
Postuloj	3882 EUR	Bonhavoj de membroj en euroj	6548 EUR
Antaŭpagitaj kostoj	0 EUR	Ŝuldoj	7502 EUR
Librostoko	610 EUR	Antaŭricevitaj enspezoj	4447 EUR
		Propra kapitalo	17359 EUR
		Kurzodiferenco 2006	1528 EUR
Sume	72606 EUR	Sume	72606 EUR

2007-12-31			
Aktivoj		**Pasivoj**	
Kontoj en euroj	30071 EUR	Fondusoj en euroj	21178 EUR
Kontoj en svedaj kronoj	53030 EUR	Fondusoj en svedaj kronoj	17968 EUR
Postuloj	921 EUR	Bonhavoj de membroj en euroj	5600 EUR
Antaŭpagitaj kostoj	0 EUR	Ŝuldoj	16443 EUR
Librostoko	610 EUR	Antaŭricevitaj enspezoj	2063 EUR
Akumulita deskribo	-80 EUR	Propra kapitalo	17359 EUR
		Rezulto laŭ kalkulo minus deskribo	3792 EUR
		Kurzodiferenco 2006+2007	148 EUR
Sume	84552 EUR	Sume	84552 EUR

Buĝetoj de ILEI por 2008 kaj 2009

Elspezoj	Reale 2006	Reale 2007	Buĝeto 2008	Buĝeto 2009
Aktivuloj (afranko, vojaĝoj, ktp)	**0.00**	**741.00**	**1000**	**1000**
Bankokostoj (pro ĝen. kaso)	**47.08**	**54.90**	**60**	**60**
Estraro	**4360.36**	**1685.50**	**4800**	**4800**
afranko, reto, ktp	1545.85	1388.65	1500	1500
kunsidoj	2814.51	296.85	3300	3300
Fakaj k.a. kotizoj	**414.73**	**547.62**	**450**	**500**
Honorarioj ĝeneralaj	**0.00**	**0.00**	**300**	**300**
Informado	**28.63**	**0.00**	**200**	**200**
IPR	**5543.60**	**5810.00**	**5850**	**6250**
presado	2780.60	2800.00	2800	2800
redaktado	712.00	712.00	750	750
sendado	2051.00	2298.00	2300	2700
Juna Amiko	**4577.03**	**4774.25**	**5170**	**5370**
presado	2068.50	1921.00	2200	2200
redaktado	409.40	451.75	470	470
sendado	2099.13	2401.50	2500	2700
Libroj (materialo, presado)	**1535.00**	**80.00**	**200**	**200**
Projektoj	**1668.15**	**4688.50**	**500**	**6000**
Projekta agado			0	2000
Flugiloj			500	1000
Interkultura agado				3000
Profito (sen kalkuli deskribon kaj kurzodiferencojn)	**2503.57**	**3872.07**	**-1350**	**250**
Sumo	20678.15	22253.84	17180	24930

Enspezoj	Reale 2006	Reale 2007	Buĝeto 2008	Buĝeto 2009
Donacoj (al ĝenerala kaso)	**15.00**	**758.00**	**1100**	**1100**
Ekzamenoj nete	**461.29**	**256.89**	**200**	**200**
Instruista trejnado (UAM)		**370.00**	**0**	**0**
Konferenco	**3156.73**	**6199.88**	**300**	**2000**
Konferencokostoj	-7250.17	-18386.16		
Konferencokotizoj	10406.90	24586.04		
Kotizoj	**9308.78**	**8421.08**	**8850**	**8850**
A-landaj	7308.82	6768.18	7200	7200
Abonoj IPR	327.60	295.20	300	300
B-landaj	1358.36	999.70	1000	1000
Retaj	314.00	358.00	350	350
Rentumo	**90.60**	**74.79**	**100**	**150**
Subvencioj	**1600.00**	**2348.60**	**2150**	**7450**
Projekta subv. de UEA			1650	1650
Fonduso Flugiloj			500	800
Fonduso Szerdahelyi				1000
Ekstera subvencio				1000
Fonduso Interkulturo				3000
Juna Amiko (abonoj)	**4481.50**	**3658.70**	**4080**	**4380**
Abonoj	4408.00	3578.90	4000	4300
Vendoj kaj donacoj	73.50	79.80	80	80
Vendoj (libroj)	**1564.25**	**165.90**	**400**	**800**
Sumo	20678.15	22253.84	17180	24930

(ĉiuj sumoj en EUR)

Raporto de la kontrola komisiono de ILEI pri la jaroj 2006 kaj 2007

Ni subskribintoj, elektitaj de la komitatkunsido 2006 por kontroli la financan administradon de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), deklaras post zorga kontrolo, ke la kalkuloj de la laborjaroj 2006 kaj 2007 estas bone registritaj, kaj ke la bankkontoj kaj fondusoj estas en bona ordo.

Ni rekomendas al la Komitato de ILEI, kun danko al la estraro pro la granda laboro farita, ke ĝi
- akceptu la bilancojn pri decembro 2006 kaj 2007
- malŝarĝu la estraron de respondeco pri la jaroj 2006 kaj 2007.

Stockholm kaj Södertälje, 2008-07-08

Ulla Luin

Bengt Jonsson

Marianne Westman

Lingva Festivalo:
Kiel starigi kaj organizi LF en via urbo?

de Dennis KEEFE, <***keefe@linguafest.info***>

(Parto II-a)

Post la elekto de lingvoj kaj kursgvidantoj, gravas, ke la kursgvidantoj estu trejnitaj. La sukceso de LF dependas de la bonaj kursoj de viaj volontulaj instruantoj. Mi rekomendas, ke vi planu pli ol unu trejnadan sesion, ĉar estas malfacile venigi ĉiujn kursgvidantojn je la sama horo, speciale se ili loĝas en granda urbo. En *Tours* mi faris ĉiujare kvar „oficialajn" trejnsesiojn po du horoj. Ili okazis kvar, tri, du kaj unu semajnon antaŭ la granda festivalo. Ĉiu instruanto devis ĉeesti nur unu el ili. Krom tiuj oficialaj sesioj, mi faris ankaŭ specialajn por la centro de

enmigrintoj. Mi jam menciis, ke ok el niaj instruantoj venis el tiu loko, kaj mi pensas, ke tiu bonveniga gesto miaflanke plaĉis al ili multe. Krome mi faris multe da neformalaj trejnsesioj eĉ en kafejoj.

Poste, kiam mi faris la unuan LF en Usono, mi multe utiligis la interreton por helpi la trejnadon. Tie miaj instruantoj estis plejparte studentoj je doktoriĝa nivelo ĉe universitato, kie ĉiuj utiligis jam en la jaro 1999 la interreton ĉiutage. Parto el tiu retejo ankoraŭ ekzistas kaj mi metis ĝin en la retpaĝaron *www.linguafest.info* rubriko *historio*. Vi povos trovi la originalan dokumenton kiun mi utiligis por la LF de 1996 kaj postaj LF-oj ĉe la retejo *www.linguafest.info*, rubriko *historio*. Mi esperas, ke baldaŭ ni komencos filmi la trejnadon de instruantoj, kaj, ke ni filmos la lingvajn kursojn por ke novaj kursgvidantoj povu pli bone lerni kaj prepari siajn fulmokursojn.

Kia estas la enhavo de la trejnado por viaj kursgvidantoj? Mi kutime dividas la trejnadon en du partojn: unu parto pritraktas la ĝeneralan organizon de la LF, kaj la alia parto priskribas kiamaniere prezenti 40-minutan lingvokurseton. Pri la kurseto mem, mi rekomendas, ke vi rigardu la artikolon en IPR 2007, numero 4. Tie mi parolas pri tio, kiamaniere fari efikan, interesan kurseton por ĝenerala publiko. Mi substrekas, ke leciono por LF ne estas kutima lingvoleciono, ĉar la celo ne estas bone instrui la bazon de la fremda lingvo, sed montri interesajn partojn de la lingvo por ke la ĉeestantoj poste pliinteresiĝu pri tiu kaj pri aliaj lingvoj. La artikolo en IPR donos al vi kelkajn ideojn pri tio, kion vi povos enmeti en via trejnsesio. Ekz., vi povos montri la principon de varieco, la partojn de leciono, kaj specimenojn de la enhavo. Konkrete, vi montros ĝeneralan skemon de la pluraj partoj de leciono kiuj inkluzivas la devigajn kaj la elekteblajn. Tiuj devigaj partoj, por resumi la IPR-artikolon, enhavas la paroladon de la lingvo dum unu aŭ du minutoj, ĝeneralan historion kaj geografion de la lingvo, demandojn fare de la gelernantoj, kaj la manieron postfestivale lerni la lingvon en tradiciaj kursoj, libroj aŭ sur interreto. La elekteblaj partoj pritraktas partojn de la lingvo mem, ekzemple gramatik-aĵojn, vortojn ktp. Tiuj elekteblaj partoj utiligas diversajn manierojn por pritrakti la lingvon: tradiciajn klarigojn, specialajn metodojn, eĉ kantojn kaj poemojn. Dum la trejnado de viaj novaj kursgvidantoj, vi montros kaj praktikigos partojn de lecionoj.[1]

[1] En via *unua* festivalo, tiu trejnado speciale gravas. Poste en dua festivalo, kelkaj el viaj kursgvidantoj jam scias kion fari, do tio faciligos vian trejn-taskon. Tamen,

La alia parto de la trejnado por la kursgvidantoj rilatas la ĝeneralan organizon de la tago aŭ tagoj de la festivalo, speciale tion kio okazas antaŭ kaj post la leciono. La sukceso de la LF multe dependas de la ĝenerala organizado, ĉar ĉio okazas rapide en malsamaj klasĉambroj en malsamaj momentoj. Nek la ĉeestantoj nek la instruantoj facile orientiĝos se vi ne tre bone organizas la ĝeneralan festivalon. La plej grava parto de la organizo estas la ĝenerala horaro[2] kiu indikas kie kaj kiam okazos la kursoj. Kutime mi prezentas tiun horaron dum la trejnsesio, blanka ĉekomence, al la instruontoj, kaj ili poste elektos la momenton aŭ momentojn kiam ili volas instrui. Ili faras tiun elekton per subskribo, kaj mi poste faras kopion de la horaro por ili, kaj mi metas ĝin ankaŭ sur la interreton. Multaj ekzemploj el tiaj horaroj troviĝas en la retejo *www.linguafest.info,* rubriko *historio, horaroj*.

Por havi la plej sukcesan LF eblan, mi ege rekomendas, ke dum la trejnado vi substreku la gravecon de la sinsekvo de aktivaĵoj kiujn kursgvidanto plenumas en la 20 minutoj *antaŭ* la komenco de sia kurseto. Dum tiuj 20 minutoj, la kursgvidanto iras al sia klasĉambro, dekoracias la klasĉambron, preparas siajn instruilojn kaj lecionon, bonvenigas gelernontojn, kaj komencas la kurseton. Se la kursgvidanto ne iras ĝustatempe al sia klasĉambro, se li aŭ ŝi ne dekoracias la ĉambron, se li ne preparas la instruilojn, se li ne bonvenigas gelernontojn, kaj se li ne komencas ĝustatempe sian lecionon, ne nur lia kurseto lamos, sed la tuta LF perdos iom da energio, efikeco, intereso, kaj finfine ĝojo. Supozante, ke la tempodaŭro de lingvoprezentado estas 40 minutoj, tiuj 20 minutoj respondas al la paŭza parto de la horo. Tio indikas, ke la antaŭa kursgvidanto finu sian kurson ĝuste post 40-minuta kurso, por permesi al la sekva instruanto prepari sin.

Por prezenti tiun sinsekvon skeme, ni diru, ke *T* egalas la momenton kiam la kurseto komenciĝas, do, kutime je la komenco de la horo: je la 9-a, je la 10-a, ktp. Ni diru ankaŭ, ke *T* – 20 (legiĝas *T* minus 20

---

en sekvaj jaroj, valoras la penon, ke eĉ jam trejnitaj kursgvidantoj refaru trejnsesion por ke la kvalito de la LF restu alta.

[2] Poste tiu horaro iĝos la plej grava gvidilo de via festivalo. Ĝi vidiĝos preskaŭ ĉie, sur muroj, pordoj, ĉe standoj, sur interreto, kaj eĉ en antaŭa ĵurnala artikolo. Ofte ĉe la ĉefstando de LF, tiu horaro estas refarita grandskale malantaŭ la stando, sur la muro.

minutoj) egalas la finiĝon de la antaŭa kurseto kaj la komencon de la preparado de la nova kurseto. Rigardu la sekvan skemon:
T – 20: La antaŭa lingvokurseto finiĝas, kaj la gelernantoj eliras el la klasĉambro.
T – 19: La sekva kursgvidanto eniras la klasĉambron, kaj komencas dekoracii la klasĉambron.
T – 15: La kursgvidanto preparas sian instruilaron, ekzemple, la skribilojn, paperojn ktp.
T – 10: La kursgvidanto iras al la enirpordo kaj metas dekoracion sur la pordo pri sia lingvo.
T – 10: La kursgvidanto bonvenigas gelernantojn.
T – 1: La kursgvidanto preparas sin por komenci sian kurseton.
T – 0: La kursgvidanto komencas sian kurseton.
T + 15: La „statistikisto" malfermas la pordon de la klasĉambro por nombri la kvanton da ĉeestantoj.[3]
T + 35: La organizanto de la festivalo iras al la klasĉambro, dirante, ke kvin minutoj restas.
T + 40: La kurso finiĝas, kaj la cirklo ripetiĝas.

Dum via trejnado, vi povas montri tiun supran skemon, kaj alivortigi ĝin por ke viaj kursgvidantoj pli bone komprenu kiamaniere ili povas pli efike kunlabori kun la aliaj instruantoj kaj kun la ĉeestanta publiko. Vi povus vortigi tiun skemon dum sesio por la trejnado de viaj kursgvidantoj eble jene: *Karaj kursgvidantoj, bonvolu alveni al la Lingva Festivalo antaŭ via leciono, ĉar estas multo farenda antaŭ la komenciĝo de via kurseto. Unue, vi iras al via klasĉambro 20 minutojn antaŭ via prezentado. Tiam vi eniras vian klasĉambron. Se la antaŭa instruanto ankoraŭ instruas, vi povas afable rememorigi lin, ke la paŭzo jam komenciĝis. Tiam vi komencas dekoracii la murojn por via klasĉambro. Eble vi metos afiŝojn pri via lingvo aŭ lando, aŭ mapon, aŭ bildojn, aŭ eĉ ĵurnalojn kiuj montras vian lingvon. Ĉiaokaze, vi metos ion sur la antaŭan muron por bonetosigi iomete la klasĉambron por via lingvo. Tiu dekoraciado okazas rapide, ĉar vi devas prepari ankaŭ vian instruilaron, eble purigi la nigran aŭ blankan tabulon, ktp. Je T – 10 vi jam finas vian dekoraciadon kaj preparadon, kaj vi iras al la enirpordo de via klasĉambro. Tie ĉe la pordo, vi respondas al demandoj de preterpasantoj*

[3] Tiu nombrado servas por koni la popularecon de la lingvoj, por helpi plani sekvajare, por informi ĵurnalistojn ktp.

kiuj volas scii kiam via aŭ alia kurseto komenciĝos, kaj kiuj volas informiĝi pri aliaj aferoj. Vi restos ĉe la pordo ĝis la komenciĝo de via leciono. Memoru, ke se la publiko ne vidas vin, ili ofte supozas, ke via kurseto NE okazos! Ĉio okazas rapide ĉe LF, kaj se vi restas ĉe la pordo dum tiuj dek minutoj antaŭ la komenciĝo de via kurso, vi multe helpos al la informado de la tuta festivalo.

Memoru ankaŭ, karaj kursgvidantoj, ke dufoje dum via instruado alvenos du deĵorantoj de la LF. La unua persono venos eble dek kvin minutojn post la komenciĝo de via kurso (T + 15). Tiu persono estas la „statistikisto" kiu silente nombros la ĉeestantojn de via kurseto. Tiu nombrado gravas, ĉar ĝi permesas al la LF diri precize kiom da personoj ĉeestas la lingvajn kursojn, kaj helpas por plani kaj organizi la LF en sekvaj jaroj. La dua persono venos eble je la T + 35 momento, do kvin minutojn antaŭ la fino de via kurso, por memorigi vin pri la finiĝo de via prezentado. Vi memoras, ke la ĝustatempa finiĝo de via kurseto gravas, ĉar la sekva instruanto bezonas tempon por dekoracii la ĉambron, kaj prepari sin.

Se vi bone trejnas kaj organizas viajn kursgvidantojn, vi havos sukcesan prezentadon kaj instruadon de la lingvoj. Ĉar la celo de LF estas la prezentado kaj eklernado de fremdaj lingvoj, via LF estos sur la vojo de bona kaj bela lingva evento. Tamen, estas aliaj faktoroj kiujn vi eble devas priatenti en via organizado. Tiuj faktoroj estas la *kromaktivaĵoj*. Ekzemple, ofte estas standoj kaj budoj ekster la klasĉambroj. En la LF de *Tours*, ekzemple, kutime estis proksimume 50 asocioj pri diversaj internaciaj aferoj, lingvolernejoj, librovendejoj ktp., kiuj alvenis por profiti la okazon. Ankaŭ estas ofte muziko kaj kulturaĵoj. En *Tours*, okazis internacia muziko kaj dancado dum la paŭzoj de la kursetoj.[4] Sed aliaj LF tute ne havas kromaktivaĵojn. Ekz., en *Tours*, ni faris ankaŭ malgrandajn LF speciale por kvartaloj de la urbo. En tiaj LF estis eble 10 lingvoj prezentataj en 30 kursetoj dum posttagmezo. Tie estis nek standoj nek muziko, nur la lingvaj kursetoj. En la LF de *Ranzan*, Japanio, kiun mi organizis, estis dudeko da lingvoj, sed tute ne okazis kromaktivaĵoj dum la festivalo.

Pri la organizado de standoj, tio multe dependas de via ejo kaj de viaj lokaj cirkonstancoj. Eble vi volas inviti nur nekomercajn grupojn kaj eble ne. Eble vi volas, ke ĉiu stando pagu por partopreni, kaj eble ne. En

[4] Ne permesu al la muzikistoj ĝeni la kursojn! Do, la paŭzoj estas la bona momento por muziko kaj dancado se vi havas tiajn elementojn en via LF.

Tours dum la unuaj jaroj de la LF, estis meznombre 40 aŭ 50 standoj, duone komercaj duone nekomercaj. Ĉiuj pagis por partopreni, sed la komercaj standoj devis pagi multe pli. Se vi volas inviti komercajn standojn, pensu pri lingvolernejoj, agentoj por lingvaj lernovojaĝoj kaj librovendejoj interalie. Por nekomercaj, pensu pri internaciaj organizoj kiel *Unesko* aŭ *Amnesty International*, pri Ambasadejoj, pri lokaj internaciaj kluboj kiel via loka hungara aŭ brazila amikaro, ktp. Kompreneble, estus bone havi esperantan standon por la LF![5] Por la ĝenerala organizo de tiuj standoj, mi rekomendas, ke estu unu persono kiu respondecas pri tiu parto, ĉar organizi la standojn estas granda laboro. Ĉiaokaze, ne forgesu, ke vi organizas Festivalon de *Lingvoj* kaj ne Festivalo de *Standoj*! La centro kaj kerno de la festivalo estas la instruado de lingvoj kaj la lingvo-instruantoj. La festivalo ekzistas por prezenti, per mallongaj kursetoj, lingvojn, kaj ne por vendi lingvokursojn en fremda lando.

Pri muziko kaj pri aliaj kulturaj eventetoj, bonvolu memori, ke tiu parto de LF povas esti ege bonvena, sed samtempe ĝi ne estas pure esenca parto de LF. En mia unua LF en Usono ni tute ne organizis muzikon aŭ aliajn kulturaĵojn, tamen la festivalo bone sukcesis. Estas avantaĝoj kaj malavantaĝoj de muzika ero en LF. Unu avantaĝo estas, ke se la kantoj estas en fremdaj lingvoj, tio kongruas kun la ĝenerala temo de la festivalo. Due, vizitantoj ege ŝatas muzikon, kaj ĝi povas helpi spici favore la etoson. Finfine, vi povas utiligi la muzikon por ritmi la kursetojn kaj paŭzojn. En *Tours*, la muziko komenciĝis tuj ĉe la fino de la kursetoj, do je la kvardeka minuto. Tiu muziko memorigis la kursgvidantojn, ke iliaj kursetoj devas finiĝi, kaj samtempe la muziko altiris la gelernantojn ekster la klasĉambron. Resume, la muziko utilis por organizi la festivalon. Sed ankaŭ estas malavantaĝoj rilate muzikon. Unue, la LF ne estas Festivalo de *Muziko*. Due, estas multe da festivaloj pri muziko kaj pri internacia muziko en multe da landoj. En tiuj muzikfestivaloj la kvalito de la muziko estas je tre alta nivelo kaj ofte tiuj eventoj ĝuas tre grandajn sumojn por siaj buĝetoj. LF ne kapablas konkurenci tiurilate. Trie, la publiko kaj ĵurnalistoj povas esti altirataj pli de la muziko ol de la lingvoj kaj tio ne helpas vian festivalon. Ofte en kelkaj landoj la televida raporto pri la LF dediĉas pli da tempo al internacia dancado ol al la internaciaj lingvoj. Bona organizado de

[5] Mi rekomendas, ke E-o estu la sponsoro de LF, kaj ke la E-stando estu la ĉefstando, kie ĉiuj informiĝas pri la tuta evento, kaj kie troviĝas la grandskala horaro pri lingvaj kursoj.

kromaktivaĵoj kiel muziko kaj dancado povas aldoni multon al via LF, sed zorgu, ke la LF ne iĝu internacia muzikkunveno.

Ĝis nun mi ne parolis pri la buĝeto por LF. Kiom ĝi povas kosti? Ĉi tie la bona novaĵo estas, ke la elspezoj por fari eĉ grandan festivalon povas esti malaltaj. Por la tria LF de *Tours*, do entute 85 lingvoj kaj pli ol 250 kursetoj, ni elspezis entute eble 1500 eŭrojn. Por la LF de la Universitato de *Illinois* kun 65 lingvoj, la tuta elspezo estis proksimume nur 150 eŭroj. Aliflanke, estas aliaj LF kiuj kostas dekmilojn da eŭroj. Do, kiamaniere fari malmultkostan festivalon?

Unue, trovu senpagan lokon. Vi faros tre bonan servon por via urbo aŭ kvartalo, ofte urbestroj volonte disponigos senpagan lokon por vi. Due, ne elspezu multe por afiŝoj kiuj anoncas la festivalon. En *Tours*, mi mem sur mia komputilo dezajnis la afiŝon, do ni devis pagi nur la fotokopiadon kaj printadon. Rigardu *www.linguafest.info,* rubriko *historio afiŝoj* por trovi ekzemplon de tiuj kaj aliaj afiŝoj. Aliaj elspezoj povas esti por sendi leterojn. Mi sendis invitleterojn al ĉiuj ambasadejoj en Francio, kaj tio kostis eble 70 eŭrojn. Same mi faris kun lernejoj kaj tio kostis eble 40 eŭrojn. Ne forgesu, ke en multe da Lingvaj Festivaloj, inkluzive la plej grandajn, neniu estas pagata. Ĉiuj kursgvidantoj volontulas, kaj se estas muzikistoj aŭ aliaj artistoj, ili ĉiuj laboras senpage.[6]

En nia diskuto pri buĝeto, mi parolis pri afiŝoj kaj tio estas parto de via informado kaj reklamado kiu okazas antaŭ la LF. Se vi bone organizas vian festivalon, sed ne sufiĉe da personoj aŭdis pri ĝi, vi ne havos multe da partoprenantoj, kaj tio malfaciligos vian organizan laboron por la sekva jaro. Do, kiamaniere informi kaj reklami pri via festivalo?

La bona informado por altiri publikon al via festivalo multe dependas de viaj lokaj cirkonstancoj. En kelkaj lokoj, afiŝoj sufiĉos por bone anonci vian festivalon. En alia loko, rekta anonco de registaro povas venigi personojn.[7] En aliaj lokoj, estos la kunligo de multaj rimedoj samtempe kiu venigos gelernantojn al via LF.[8] Tion dirinte, ni trarigardu

---

[6] Dum mia estrado de Lingvaj Festivaloj, estis nur unu escepto: mi pagis, fakte el mia propra poŝo, la benzinon por la grupo de sudamerikaj muzikistoj kiuj venis el Parizo al Tours por la LF de 1997.

[7] Aŭ anonco de universitataj oficialuloj. Ĝuste tion mi planas por la starigo de LF en Ĉinio ĉi-jare.

[8] Tiu kunligo de anoncoj kaj reklamoj estas baza principo de merkatiko kaj reklamado. Se la efiko de ĵurnalo estas, ni diru, 5x, kaj la efiko de afiŝoj estas 8x, la

almenaŭ kelkajn bonajn rimedojn kiuj donis bonan rezulton en kelkaj landoj. Unue, afiŝoj. En nia festivalo de *Tours*, ni tute kovris la universitaton kaj multe da aliaj lokoj per afiŝoj. Fakte ni printigis pli ol mil afiŝojn en formato A3, kaj kelkmilojn da flugfolioj kun la sama enhavo por disdoni surstrate, ĉe la universitato, kaj eĉ sur parkitaj veturiloj.[9] La plej granda parto el nia buĝeto estis por tiuj afiŝoj, speciale la grandaj kaj koloraj. En multe da urboj ne eblas pro lokaj reguloj meti afiŝojn surmure surstrate. Ankaŭ en *Tours* ne estis facile fari tion, sed ni utiligis multege da afiŝoj ene de lernejoj kaj speciale ene de la konstruaĵoj kaj loĝlokoj de la universitato.

Krom afiŝoj, en la semajno antaŭ la Lingva Festivalo, mi persone intervjuiĝis en eble dek radiostacioj. Tiuj intervjuoj aŭdiĝis, kelkfoje, ankaŭ tutlande. Ĉe multaj nacioj tiu eblo ekzistas. Pli malofta eblo estas intervjuiĝi en televido, sed tion ni faris en *Tours* en la unuaj jaroj. Tamen post la festivalo, do tro malfrue por altiri publikon, multe da televidstacioj faris raporton pri la LF. Almenaŭ du tutlandaj televidstacioj kaj multaj regionaj televidoj faris raportojn. Por vidi specimenon de la televida raporto de la unua novaĵprogramo en Francio, iru al la retpaĝo *www.linguafest.info*, rubriko *televido*. Same okazis en Usono kun la lokaj televidstacioj.

Eble la plej bona maniero anonci vian Lingvan Festivalon estas aperigi artikolon en via loka ĵurnalo. Se vi pagos por havi anoncon, ĝi certe aperos en la ĝusta loko kaj en la ĝusta tago. Tamen, mi pensas, ke tia pagado ne estas la bona vojo por LF, ĉar ĝi uzas tro da elspezoj, kaj la LF en si mem estas sufiĉe interesa afero, por ke ĝi meritus senpagan, novaĵ-anoncon. En la granda LF de *Tours*, mankis alloga artikolo pri la venonta LF, tamen ĉeestis la kursetojn pli ol 3600 personoj. Tiu tiama rekorda ĉeesto devenis de la afiŝoj, la radio kaj aliaj rimedoj, kiuj kune efikis por altiri homojn al la LF. Ankaŭ notinda estas la fakto, ke la LF havis bonan reputacion en la urbo, ĉar la dua LF havis jam 65 lingvojn kaj 2300 partoprenantojn. Resume, mi esperas, ke nun vi havas pli klaran ideon pri unu maniero organizi Lingvan Festivalon. Memoru, ke estas multe da aliaj manieroj sukcesi, kaj la ĉefa parto de sukceso devenas rekte de viaj

---

efiko de du rimedoj kune estas pli ol 8x plus 5x, eble ĝis duoble pli efike, do 26x, ekzemple.

[9] Sur parkitaj veturiloj je distanco de malpli ol unu kilometro de la festivalejo. Ni petis kaj ricevis permeson por surmeti flugfoliojn ankaŭ en privitaj parkejoj en kiuj troviĝis centoj da veturiloj.

kursgvidantoj. Se vi estas la estro de LF, neniam forgesu, ke vi rolas estre por servi al la kursgvidantoj, kaj ne inverse. Se la LF sukcesas, estas ili kaj iliaj lingvoj kiuj sukcesigis ĝin. Via rolo estas faciligi tiun sukceson. Vi elektos la bonan momenton, la bonan lokon. Vi serĉos kaj trovos lingvojn kaj kursgvidantojn. Vi trejnas ilin. Vi certigos, ke ĉiuj kursgvidantoj sekvos la horaron kaj kunlaboros por la festivalo. Vi ne forgesos meti la ĝeneralan horaron kun la lingvoj kaj la horoj kaj la klasĉambroj ĉie proksime kaj en la festivalejo por ke ĉiuj partoprenontoj, ĉu lernontoj ĉu kursgvidontoj, tre facile trovu sian kursejon ĝustatempe. Vi trovos standojn kaj eventuale internaciajn muzikantojn. Vi memoros ankaŭ abunde anonci vian festivalon afiŝe, ĵurnale, radie, eĉ televide por ke viaj bone trejnitaj kursgvidantoj havu sufiĉe da gelernantoj.

Do nun, ek al la laboro! Vi mem povas starigi vian unuan Lingvan Festivalon jam en ĉi tiu *Internacia Jaro de Lingvoj*. Mi esperas, ke ni ĉiuj legos pri via Lingva Festivalo en la paĝoj de la Esperanta gazetaro. Mi esperas, kiel okazis kun *Aleksandr BLINOV* de la LF de *Ĉeboksaro*, ke vi trovos centojn da novaj gelernantoj de E-o pro la LF. Bonan ŝancon, kaj bonan Festivalon! (*fino*)

El la landoj kaj sekcioj…

Finnlando



En la Popola Instituto de Valamo fine de junio 2008 okazis la 9-a sinsekva E-kurso. La kurso estis aranĝata kunlabore kun E-Asocio de Finnlando (EAF) kaj la Popola Instituto de Valamo. Ĉeestis 23 gelernantoj, kiuj estis dividitaj en tri kursoniveloj: elementa, daŭriga kaj konversacia. La kurso havis 3 instruistojn: kun *Atilio ORELLANA ROJAS* kaj *Tiina OITTINEN* kunlaboris ĉi-jare *Patrik AUSTIN*, instruisto-muzikisto. Ĉiuj tri instruis ĉiujn kursonivelojn. En la konversacia grupo [*vd. la foton*] estis 3 eksterlandanoj

(el Svedio, Estonio kaj Rusio) kaj en la daŭriga grupo du blinduloj. Ĉiu instruisto uzis proprajn materialojn. En la elementa kaj daŭriga grupo *Patrik* kaj *Tiina* uzis ankaŭ la elementan lernolibron *Egaleco kaj paco per E-o* (sveda originalo de *Lars FORSMAN*, finnlingva traduko de *Raita PYHÄLÄ*). La kurso atingis ankaŭ intereson de la gazetaro: dufoje okazis radiointervjuoj. Artikolo aperis en loka gazeto *Heinäveden lehti* komence de julio.

Venontjare okazos la jubilea, 10-a kurso en Valamo inter la 22-a kaj 26-a de junio. Pliajn informoj aperos aŭtune en la retpaĝoj *www.esperanto.fi.*

laŭ Tiina OITTINEN, sekretario kaj kursogvidanto de EAF

Germanio

Post preskaŭ 2-jara kontaktado, korespondado inter la lernejoj en Bar Hill/Cambridge, Britio kaj Herzberg am Harz, Germanio okazis la unua renkontiĝo de Springboard-lernejanoj en Herzberg kun partopreno de 9 infanoj, 8 gepatroj kaj 3 instruistoj. La bonsukcesa 5-taga vizito, la persona interkonatiĝo estas grava elemento de la projekto kaj certe neforgesebla aventuro por ĉiuj partoprenintoj.



Gastoj kaj gastingantoj en la stacidomo

Dum la vintra semestro 2007/2008 en la Universitato de Leipzig (Germanio) okazis modulo kun la titolo “Universalaj lingvoj”. Ĝi estis iniciato de la germana Societo pri Interlingvistiko (*Gesellschaft für Interlinguistik*) kaj estis subvenciita de la usona fondaĵo *Esperantic Studies Foundation*. Instruis *Sabine FIEDLER* (prelegoj kaj seminarioj) kaj *Alida KAPLICK* (lingvokurso). La elekteble-devigan modulon finis per sukcesaj ekzamenoj 30 studentoj.

***

Antaŭ 40 jaroj, en 1968 germana Landa Sekcio de ILEI estis novfondita per akcepto de nova statuto kaj ekhavo de nova nomo: Asocio de Germanaj E-Instruistoj. Ni kore gratulas al ĉiuj, kiuj ekde tiam estas membroj, aktivaj kunlaborantoj de nia asocio.

***

En Herzberg – la E-urbo (Germanio) kaj Góra (Pollando) E-instruado okazas paralele en la ĝemelurbaj lernejoj dum la lernojaro. En aŭgusto la 3-an fojon okazis SALO, somera arbara lernejo por la lernejanoj, kiuj uzis E-on dum la 2-semajna kunestado. Krom la ĉiutaga 5-hora E-instruado okazis multaj interesaj libertempaj aktivecoj, ekskursoj.

Italio

Kristnasko: bilde kaj poezie

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun aĝo de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj sendu, ĝis la 10a de novembro 2008, siajn verkojn al la jena adreso: ESPERANTO TRIESTE - C.P. 601 Trieste Centro, IT-34132 TRIESTE – ITALIO. Oni rajtas kontribui per unu aŭ pli da verkoj pri la supre indikita temo, en la kategorio: 1) desegnaĵo, maksimume unu A4-formata folio; 2) poeziaĵo. La desegnaĵo havu komenton aŭ frazon en E-o kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro. La poeziaĵo estu en E-o kaj en la gepatra lingvo de la aŭtor/in/o. Por ĉiu verko estu ankaŭ indikitaj: persona kaj familia nomoj; aĝo; lernejo kaj klaso; poŝta adreso. Se eblas, bonvolu aldoni malgrandan foton de la aŭtor/in/o. Ĉiuj konkursaĵoj prezentiĝos al publiko dum la kristnaska periodo 2008. La vizitontoj kaj elektota ĵurio donos poentojn al la plej bela verko el la du kategorioj. Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj; de 9 ĝis 11 jaroj; de 12 ĝis 14 jaroj) enkadre de publika ceremonio en Triesto.

Por kromaj informoj: noredv@tele2.it aŭ testudo.ts@gmail.com

Kroatio

Pokalo Kostrena



La sepa, tradicia kroata konkurso pri scio de E-o por lernantoj el elementaj lernejoj okazis en la E-Domo en Kostrena de la 16-a ĝis 18-a de majo 2008. Organizis ĝin Kroata E-Ligo (KEL) kaj Unuiĝo de Prelegantoj de E-o (UPE), kunlabore kun E-Societo Rijeka, gastiganto de la projekto.
La konkurso mem okazis sabate. Dum la konkursa komisio trarigardis la testojn, la gelernantoj ekskursis en Crikvenica.
Dimanĉe la komisio proklamis la venkintojn de la konkurso:
En kategorio "A" (komenca):

1. Dorotea MARTINEC - Elementa lernejo (EL) "Mladost" Zagreb
2. Petra SARIĆ - EL "Mladost" Zagreb
3. Danijel HRVATIN - EL "A. Mohorovicic" Matulji

En kategorio "B" (progresinta):

1. Tena KUZMANOVIĆ - EL "Retkovec" Zagreb
2. Nikolina GEGIĆ - EL "Retkovec" Zagreb
3. La tria premio ne estis atribuita

La Pokalon Kostrena 2008 por la plej bona lernejo gajnis EL "Retkovec" Zagreb. La medalon por la plej juna konkuranto ricevis Marija GEGIĆ el EL "Retkovec" Zagreb. UPE donacis al ĉiu lernanto la porinfanan libron "Kamaradaro de Petro Nodeto" de Mato LOVRAK. Danke al financa subteno de Ministerio pri scienco, klerigado kaj sporto, UPE premiis la du plej sukcesajn lernantojn en ambaŭ kategorioj per partopreno en la Internacia Infana Kongreseto 2008 en Oostvoorne, Nederlando. La projekton finance subtenis la urbo Rijeka, Sekcio pri Klerigado kaj lernejoj. Ni invitas vin al la konkurso 2009.

laŭ Emil HRVATIN kaj Marija JERKOVIĆ

Pollando

La 2-an de junio 2008, okaze de Internacia Tago de Infano, la baz-lernejon n-ro 33 en Bielsko-Biała „vizitis" tre gravaj gastoj el Bialistoko, Ludoviko kaj Klara Zamenhof. En la historiaj vestaĵoj el la epoko de la

familio Zamenhof, ili alvenis al Bielsko-Biała per trajno, kiu, la antaŭan tagon ricevinte la nomon Zamenhof, atingis nian urbon.



Dum la renkontoj kun la infanoj, niaj gastoj prelegis pri E-o, pri la vivo de Ludoviko kaj pri lia paca ideo, reklamis ankaŭ la naskiĝurbon de la Kreinto de la belega Internacia Lingvo.
La gelernantoj kun granda atento kaj interesiĝo aŭskultadis la interesan prelegon kaj eĉ ekkonis kelkajn E-vortojn, kiuj sonis bele kaj plaĉis al la gejunuloj.

Pasis unu semajno, kaj denove la gelernantoj travivadis novan, gravan eventon.
Okaze de la lerneja „Familia Festeno” honoris la lernantojn eŭrodeputitino *Margerita HANDZLIK*, eistino.



La plej junaj gelernantoj solene bonvenigis ŝin kaj surprizis.

Svingante per verdaj flagoj ili ĝoje deklamis Esperante la verson „Zamenhof” de Vladimir Ĥodin.

Elżbieta BISKUP

Somera E-Studado kaj *lernu!* kuniĝis en Slovakio

Rapida kaj efika disvastiĝo de E-o en la interreto jam antaŭ iom da tempo evidentigis la fakton, ke pli kaj pli da homoj (precipe junaj) lernas E-on perrete. Ili ofte dum la tuta lerno-proceso ne havas kontaktojn kun e-istoj aŭ E-movado, ekzistantaj en la reala mondo. Tiel lernantoj de la lingvo ne povas ekhavi iun pli stabilan rilaton al E-o kiel lingvo, kulturo kaj pensmaniero. Tiu ĉi situacio lasttempe helpis aperi pli kaj pli da diskutoj pri bezono kaj eblecoj altiri lernantojn de E-o, precipe la junajn, de la reta medio al la reala mondo. Ĉi-somere okazis provo realigi tiun ĉi celon: en Lernejo por plua edukado de Universitato Comenius, situanta en la konata slovaka ripoz-loko Modra-Harmónia, estis kunligitaj du apartaj aranĝoj, tamen proksimaj laŭ celoj: jam la dua Somera E-Lernejo (SES) kaj la unua renkontiĝo de uzantoj de la paĝaro *lernu!*. Ĉefa organizanto de la aranĝo estis *Peter BALÁŽ*, al kiu multe helpis membroj de SKEJ (Slovaka E-Junularo) kaj la teamanoj de *lernu!*. Parton de la aranĝo finance subtenis la usona fondaĵo *Esperantic Studies Foundation* (ESF).

La aranĝo daŭris 8 tagojn: inter la 9-a kaj la 17-a de aŭgusto, kaj kunligis 105 partoprenantojn kies aĝo variis de 3 monatoj ĝis 90 jaroj. Ili reprezentis 25 landojn kaj 4 kontinentojn, kaj tio ne nur rajtigis la aranĝon sin nomi „internacia“ sed vere helpis krei internacian etoson kaj atmosferon en la somera lernejo kaj inter ĉeestantoj.



Komuna foto de la partoprenantoj de SES

Mirinda estis la fakto, ke por plejmulto de la partoprenantoj tiu ĉi somera lernejo estis la unua E-aranĝo, kvankam kelkaj el ili jam flue parolis E-on. Tio ankoraŭfoje montris la fakton, ke multe da homoj nuntempe lernas E-on per interreto kaj ne praktikas ĝin en vivaj renkontiĝoj. Tia situacio igis la organizantojn dividi la komencantojn en du grupojn: lingvaj komencantoj, kiuj neniam lernis E-on, kaj aranĝaj komencantoj – homoj, kiuj jam regas la lingvon, sed ankoraŭ ne partoprenis en iu ajn aranĝo kaj ne bone komprenas movadajn aferojn, etoson kaj la ideon de E-o. Tiom specifa partoprenantaro igis enkonduki kelkajn novaĵojn: por helpi al la komencantoj estis kreita grupo de „anĝeloj“ – spertaj e-istoj, kiuj estis ĉiam pretaj respondi la demandojn de malpli spertaj partoprenantoj, helpi al novuloj pli bone kompreni E-kulturon kaj ĝiajn erojn aŭ simple helpi solvi aperintajn ĉiutagajn problemojn. Celo de la anĝel-projekto estis ne nur helpi al novuloj, sed ankaŭ aktivigi kaj vigligi la spertajn e-istojn, kiuj foje jam enuas pro la sama skemo de la aranĝoj kaj manko de nova sperto kaj aktiva rolo. La malkovro, ke la plejmulto de la partoprenantoj estas novuloj kaj neniam ĉeestis iun ajn E-aranĝon, igis jam surloke aldoni kelkajn programerojn (kiel, ekzemple, *diskutrondo pri E-aranĝoj*), kiuj estis enkondukaj al E-movado kaj kiujn ĉeestis multe da partoprenantoj.

Tamen la ĉefan programon de la aranĝo oni provis konstrui laŭ la plej tipa e-ista aranĝ-skemo. La programo estis dividita al antaŭtagmeza, posttagmeza kaj vespera (kaj libera nokta) programoj.

Antaŭtagmeze preskaŭ ĉiuj partoprenantoj diligente studis en klasĉambroj. Ĉiutage, krom dumtaga ekskurso al Vieno, okazis 2 lecionoj po 1,5 horo kun intertempaj kafopaŭzoj. Entute la kurso ampleksis 26 akademiajn horojn de studado. La partoprenantoj estis dividitaj en 5 grupojn laŭ rezultoj de la testo, skribita dum la unua tago. La grupoj diferencis laŭ lingva nivelo: A1, A1+, A2, B1, C1. Ilin respektive gvidis *Stano MARČEK, Dalia PILECKIENĖ, Petra SMIDELIUSZ, Birke DOCKHORN* kaj *Bertilo WENNERGREN*. Ĉiu instruisto uzis sian propran sperton, individuajn metodojn, kaj la rezulto estis tre kontentiga: tion eblis diri kaj laŭ la kontentaj rimarkoj de partoprenantoj, kaj laŭ ilia provo kaj deziro paroli Esperante eĉ post la oficiala lernado antaŭtagmeza. Dume teamo de *edukado.net* filmis ekzemplajn lecionojn por sia kolekto de didaktika video-materialo. Posttagmeze oni povis partopreni en duontagaj ekskursoj al la ĉirkaŭaĵo (estis tri tiaj ekskursoj) aŭ ĉeesti prelegojn, uzinojn, instruadon de fremdaj lingvoj ktp. Al la programo signife kaj valore

kontribuis partoprenantoj mem kaj invititaj eksteraj prelegantoj, kiuj plejparte helpis pli bone ekkoni kulturon de la gastiganta lando – Slovakio. Grandan parton de programeroj – kiel prezentoj, uzinoj kaj diskutrondoj – gvidis la teamo de *lernu!*. Multe da partoprenantoj eluzis eblecon ne nur konatiĝi aŭ ekvidi kreintojn de la plej fama lern-paĝaro por E-o, sed ankaŭ helpi al ili per sia kritiko, rimarkoj kaj esprimitaj bezonoj. Por granda parto de la ĉeestantoj ĝuste *lernu!* estis la ponto, gvidinta ilin al ilia unua E-aranĝo. En la laborkunsidoj de teamoj de *lernu!* kaj E@I estis traktataj la plua evoluo kaj lanĉitaj kelkaj kunlabor-ideoj kun ILEI, ekzemple: plurlingva serio de *lernu!*-kajeroj kiuj povas esti precipe utilaj por landaj E-movadoj kiuj ne havas proprajn informmaterialojn kaj lernolibrojn, kunlabora revivigo de la projekto Interkulturo, *lernu!*-seminarioj dum la konferencoj de ILEI, "Flugiloj de Malfacila Vento" dum SES. Vespere oni povis ĉeesti tiajn programerojn kiel koncertoj, vin-gustumado kaj Internacia Vespero. Nokte oni povis pasigi la tempon en lokoj kutimaj por junularaj aranĝoj – trinkejo, gufujo, ludejo kaj apude estanta dancejo.

Dum la tuta aranĝo por la organizantoj tre grave estis observi la humoron, impresojn kaj rimarkojn de la partoprenantoj por povi rapide solvi faritajn erarojn kaj forigi mankojn, aŭ noti konsilojn por sekvaj similaj aranĝoj. Multe da partoprenantoj uzis la eblecon rekte esprimi sian opinion pri la aranĝo al organizantoj aŭ „anĝeloj", kelkaj anonime lasis siajn rimarkoj en la speciale por tio pendigita SES-koverto, tamen plej multe esprimis sian opinion plenigante demandaron, pretigitan de *lernu!*-teamo. Tiu ĉi demandaro ne nur helpis ekscii ĉu lernantoj estas kontentaj, sed ankaŭ esplori iliajn antaŭ-timojn/dezirojn, pretecon reveni al similaj aranĝoj, ĉeestadon de diversaj programeroj, kaj donis aliajn valorajn informojn.

Ĝojinda estis la malkovro, ke la aranĝo lasis bonan impreson al la plejmulto de la partoprenantoj, kaj tiu ĉi sukceso estis plej grava inspiro por organizantoj kaj ankaŭ igis jam dum la aranĝo ekpensi pri ebleco organizi similan lernejon dum la sekva jaro. Homoj ĉefe estis kontentaj pri kvalito de studoj, kion certigis profesiaj instruistoj, kaj pri etoso de la aranĝo kaj E-kulturo, kio por la plej multaj el ili estis novaĵo. Ekz., *Bernard LEWIS* - tradukisto de Irlando - flame esprimiĝis „*Mi tre bone lernis dum tiu ĉi kurso kaj tre ĝojis pri ŝanco multe paroli dum lecionoj. Mi jam partoprenis multe da someraj lingvaj lernejoj, sed nur ĉi tie mi povis tiom multe rekte apliki sciojn. Mi ankaŭ estas tre kontenta pri programo, vesperaj programeroj kaj homoj [aliaj partoprenantoj] kaj tio, ke ili havas tre*

malfermitan pensmanieron kaj kreas tre amikan atmosferon. Nun mi jam komprenas, ke E-o estas ne nur lingvo, sed ankaŭ homoj“.

Certe, tre bonvena dum la aranĝo kaj post ĝi estis kritiko, kiu helpis malkovri mankojn de la ĉi-somera lernejo. Plej multe da plendoj rilatis al manĝaĵoj, kiuj plejparte estis slovakaj specialaĵoj, ne ĉiam bongustaj por eksterlandanoj. Oni menciis ankaŭ la mankon de speciala programo por infanoj (kaj speciala lerno-kurso por ili), unuopaj partoprenantoj esprimis ankaŭ aliajn malavantaĝojn/mankojn. La organizantoj mem dum la aranĝo povis rimarki erarojn, faritajn pro manko de sperto organizi tiutipan aranĝon. Ekz., evidentiĝis manko de pli multe da tradukoj al aliaj naciaj lingvoj: ĉefa informo antaŭ vespera programo ĉiam estis tradukata en la anglan kaj slovakan lingvojn, sed mankis la tradukoj de programoj ankaŭ dum la ekskursoj. Evidentiĝis manko de lernigaj programeroj posttagmeze, pli da komuna laboro inter la 5 stud-grupoj. Sed tiuj ĉi kritikoj aŭ rimarkoj ne povis superigi la bonajn impresojn de la partoprenantoj kaj eĉ donis bonan kaj valoran sperton por estontaj aranĝoj.

Surfote: Transdono de la diplomoj fine de SES



Indrė PILECKYTĖ, Litovio

Korekto

En la artikoleto aperinta en IPR 08/1, paĝoj 30-31 estas du eraroj: La ĝusta adreso de "Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo" (IĈLM) estas: http://www.icxlm.org/. La ĝusta nomo de la informanto estas: *Enrique ELLEMBERG* (el urbo Fremont, Kalifornio, Usono) – vd. tiun eraron ankaŭ titolpaĝe! Pardonu pro la eraroj – NdlR

LABORKOMISIONOJ

Ekzamena: Mireille Grosjean (Prezidanto); Boris Grigorjeviĉ Kolker (Vicprezidanto), Reza Torabi (Sekretario), Julián Hernández Angulo, Antonio Leoni de León, Oliver Mazodze, Mónika Molnár
Elekta: Tieko Isikawa, Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute
Kontrola: Ulla Luin, Bengt Jonsson, Marianne Westman
Lerneja: Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tieko Isikawa, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi
Regulara: Marija Beloŝeviĉ, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas
Terminara: Maŭro La Torre, Miroslav Malovec

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, *cantskog@kolumbus.fi*
E@I (*Esperanto ĉe Interreto*, *www.ikso.net*): faka sekcio de **TEJO** (poŝtadreso ĉe UEA).
FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj):* Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop**, *esperanto@Education.monash.edu.au*
IEI: *Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.*
TEJO: Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Gregor Hinker** (*http://www.tejo.org/*).
UEA: *Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*. *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Radojica Petrović**. A-komitatano el ILEI: **Atilio Orellana Rojas**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**. Reprezentanto de ILEI en la Afrika Komisiono de UEA: **François Hounsounou**
UNESKO (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI**: François Lo Jacomo**, *72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr*; **Monique Arnaud**, *Ecole Chemin de l' Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@tiscali.fr*; **Jean-Pierre Boulet**, *17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60*; **Mireille Grosjean**, *Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, tel/fakso: (+41 32) 932 18 88*, *mirejo.mireille@gmail.com*

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 4 EUR (A) kaj 2 EUR (B). Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al la kasisto de ILEI: **Sjoerd Bosga**, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel.: (+46 21) 41 70 45, sjoerd@esperanto.se*.
La pagoj povas okazi pere de konto de ILEI ĉe UEA, aŭ al la sveda konto.
* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku vian nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).
* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Föreningssparbanken. El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.
* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.
Hejmpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA*, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*.
Presado: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, tel: (+32-3)-234 34 00.*
Redaktejo: NÉMETH József, *HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5.* Rete: *<jozefo.nemeth@gmail.com>*, *http://www.ilei.info/ipr/;* tel*: (+36-89) 356-050.* La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj.
Informas: Rob MOERBEEK*, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, *<r.moerbeek@wanadoo.nl>*.

SEKCIOJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana, *selimibardhyl@yahoo.com*

Aŭstralio: Penny Vos, 14 Candelo St, AU-2550 Candelo NSW, *penivos@yahoo.com*

Belgio: Iwona Kocięba, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem, *iwona.kocieba@telenet.be*

Benino*:* François Hounsounou, BP 226, BJ-Lokossa-Mono, *hounfranc@yahoo.fr*

Brazilo: *vakas geinstruistoj@ileibr.org*

Britio: Tellier Angela, 10 Marina Gardens, GB IP11 2HW Felixstowe, Suffolk, *angela@esperantoeducation.co.uk*

Ĉeĥio: Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratíškovice 938, *melicharkova@quick.cz*

Danio: Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4. tv. DK-2100 Kobenhavn, *arnecasper@dbmail.dk*

Finnlando: Carola Antskog, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito *cantskog@kolumbus.fi*

Francio: Michel Dechy, 65 allée de la Crémaillère, FR-59650 Villeneuve d'Ascq, *michel_dechy@hotmail.com*

Germanio: Zsófia Kóródy, E-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, *zsofia.korody@esperanto.de*

Hungario: József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, *jozefo.nemeth@gmail.com*

Irano: Hamzeh Ŝafii, P.O. Kesto 17765-184, IR-Teheran, *hamzeh@esperanto.org*

Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma, *silkovojo@aliceposta.it*

Japanio: Isikawa Tieko, 103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama JP-353-0006, *isksanjo@ff.e-mansion.com*

Katalunio: Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2-4-2, ES-17300 Blanes, *pmarti10@xtec.cat*

Korea Resp.: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon KR-402-751, *shcho@inha.ac.kr*

Kroatio/KEL: Marija Jerković, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, *mjerkovic@net.hr*

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kuŝlanova 59, HR-10000 Zagreb, *ilei@hes-keu.hr*

Kubo: Marta Alonso Gutiérrez, Malecón 659 entre Belascoaín y Gervasio; CU-10200 Ciudad de La Habana, *kubesp@enet.cu*

Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, *iesperanto@versatel.nl*

Norvegio: Anne-Karin Bondhus, Gjerdeveien 157, NO-4028 Stavanger, *akbondhus@c2i.net*

Pollando: Piotr Nosek, ul. Zbrojów 10/8, PL-30 042 Kraków, *piotr.esp@gmail.com*

Rumanio: Mihai Trifoi, Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, *trifoi@honoris.ro*

Rusio: Irina Gonĉarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000, *mirina@online.ru*

Svedio: Agneta Emanuelsson, Carl Ugglas väg 6, SE-641 37 Katrineholm, *agi.emanuelsson@telia.com*

Svislando: Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets, *mirejo.mireille@gmail.com*

Togolando: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T.I.E.To, B.P. 13169, Lome-TOGO, *esp.togo@cafe.tg*

Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti 32-108, UA-43026 Luck-26, *nina_daniljuk@ukr.net*

Usono kaj **Kanado:** Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US), *dorothyh77@gmail.com*

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, *LIDELB@freenet.am*

Barato/Hindujo: Venkatesh Reddy, No. 216, Off main Road, Whitefield, Bangalore 66, Karnataka, *esperovr@yahoo.co.in*

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenovîć, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000, *hecg@uea.org*

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, *loftur@skyrr.is*

Israelo: Gian Piero Savio, 13/4 Menora-str. IL-53490 Givatajim, *saviogp@zahav.net.il*

Kongo DR: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P.13, CD-Lukala, Bas-Zaïre

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, *tikoguau@gmail.com*

Litovio: Algimantas Piliponis, Kavoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius, *piliponis@centras.lt*

Meksiko: José de Jesús Corrales C., Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo. *jdjcorrales@yahoo.com.mx*

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1, *gwenda.s@ihug.co.nz*

Serbio: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36, RS-32000 Ĉaĉak, *radp@ptt.yu*

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Poĉtamt, UZ-700000 Taŝkento, CIS, *esperuzo@mail.ru*